

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

9


1996

中國報道

EL POPOLA

ĈINIO





Ĉe sunsubiro

Foto de LI YUWEI

## INTER NI

*La nuna jaro koincidas kun la 10-jara datreveno de la forpaso de s-ro Hujucz. Karmore al li, ni aperigas ĉi-numere la artikolon "Hujucz, giganto de la epoko", kiun dediĉis s-ro Chen Yuan, fama filologo kaj esperantisto de Ĉinio. Kiel dirite en la artikolo, s-ro Hujucz estis la plej elstara propagandanto kaj organizanto de nia movado. Li batalis por la patrolando, por la paco, por la homaro, por la E-movado, por la disvastigo de kulturo, unuvorte por la plej bela idealo de la homaro.*

*Ni honoras lian memoron ne nur pro lia granda kontribuo al nia lingvo, sed ankaŭ pro lia sindonemo al E-movado kaj lia persisteco en la interna ideo de Esperanto. Inspirite de lia sindonemo kaj persisteco, la ĉinaj esperantistoj faras ĉion eblan por la disvolviĝo de E-movado, venkante diversajn malfacilaĵojn.*

*S-ro Chen Yuan, kiel intima amiko de s-ro Hujucz, prenas disradiadon de lia spirito kiel*

*sian taskon. Ni kore dankas lin pro lia kontribuaĵo.*

*Ni aperigas ĉi-numere, krom la artikolo "Hongkong Iras al 1997" sub la rubriko "Temo Proponita de Legantoj", ankaŭ la artikolojn "Aboco de Vejĉi-ludo", "Fremdaj Influoj en la Ĉina Lingvo" kaj "Iom pri Sengrasigo". Ankaŭ la lastaj estas proponitaj de niaj legantoj.*

*Ekster nia atendo, ke vejĉi-o, kiu originis el Ĉinio kaj furoras en la Oriento, tre interesas multe da niaj legantoj en la Okcidento. Sed menciindas, ke la artikolo ĉi-numera konigas al vi abocon de vejĉi-o. Eble vi ellernos ĝin en 20 minutoj. Tamen vejĉi-o estas variema. Por fariĝi eminenta vejĉi-isto necesas penado dum multaj jaroj. Kompreneble, vi povas provi vejĉi-ludon, se vi interesiĝas pri ĝi.*

*"Balotado de kamparanoj pri vilaĝestreco" prezentas ŝanĝigon en la politika vivo de ĉinaj kamparanoj. La ŝanĝigo, kvankam bagatela, montras la fakton, ke la faro de vilaĝestro estas nedisigebla de la vivo kaj laboro de la vilaĝanoj.*


**La Red.**

# ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Hujucz: Giganto de la epoko
- 9 Estro de subprovinco
- 10 *TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:*  
Hongkong iras al 1997
- 12 Senlaca semanto de Esperanto
- 14 *ESP-NOVAĴOJ*
- 15 *POR KOMENCANTOJ:*  
Hirundoj kaj paseroj
- 16 *VOĈO DE E-ISTOJ:*  
Instruado de la ĉina komuna parollingvo surbaze de Esperanto
- 17 *POEMOJ:*  
Altas la monto longas la vojo; Amego al la vivo
- 18 Ĉinaj emeritoj
- 20 Landa Esperanto-biblioteko fondita en Ĉinio
- 21 *EN ĈINAJ URBETOJ:*  
Antikva urbeto Shendu
- 24 *VIRINOJ KAJ INFANOJ:*  
Tri virinoj en polusoj
- 26 *ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:*  
Gaja danco de kamparanoj
- 28 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 29 *LAŬ LA SILKA VOJO:*  
Profundaj sentoj al la Silka Vojo
- 36 Balotado de kamparanoj pri vilaĝestreco
- 38 *ĈINA KULTURO:*  
Fremdaj influoj en la ĉina lingvo
- 40 Iom pri sengrasigo
- 42 Tibetaj moroj
- 43 *KORESPONDI DEZIRAS*
- 44 En ĝardeno de kaŭĉukaj arboj
- 46 *KURANTAJ AFEROJ*
- 48 Aboco de vejĉi-ludo
- 50 *GALERIO:*  
Porcelana botelo de Yuan-dinastio
- SUR LA KOVRILO:*  
S-ro Hujucz, pioniro de la ĉina E-movado Foto de **Jiang Qisheng**
- 2 Ĉe sunsubiro  
*SUR LA DORSKOVRILO:*  
Pitoreskejo Jiuzhaigou

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Tibeto (p. 42)
2. Guizhou (p. 9)
3. Xishuangbanna (p. 44)
4. Shendu (p. 21)
5. Hongkong (p. 10)



# Hujucz: Giganto de la epoko

**Spirito de nia epoko, filo de la ĉina popolo, senlaca batalanto de Esperantujo**

**J**ANUARE de 1986 Hujucz fermis siajn okulojn en hospitalo kaj silente forlasis nian Esperantujon, al kiu li korinklinis dum la tuta vivo; sian patrolandon, al kies sendependeco kaj liberigo li oferis sian tutan energion; kaj la mondon, en kiu li batalis 90 jarojn. Li foriris por ĉiam. Se li ankoraŭ vivus, li devus havi 100 jarojn. Estas tre malmultaj, kiuj povas vivi 100 jarojn. Tion mi scias, tamen mi ankoraŭ plendis kontraŭ la Ĉielo. Kial ĝi ne lasis Hujucz vivi pli longe je nur 7 monatoj? Se jes, li povus partopreni la 71-an UK okazintan en Pekino kaj s-ro Grégoire Maertens, tiama prezidanto de UEA, ne bezonus peti pli ol 2 000 kongresanojn stari en silento por honori la memoron al li ĉe la inaŭguro de la kongreso. Sed la Ĉielo ĉiam lasis al ni bedaŭron, kelkfoje eĉ tiel grandan, ke nia koro disŝiriĝis. Ĉe la fino de decembro 1985, du semajnojn antaŭ lia enhospitaliĝo, mi vizitis lin en lia hejmo kaj invitis lin ĉeesti la Unuan Tutlandan Konferencon pri Ĉina Skriba Lingvo, ĉar li dediĉis duonon de la vivo al la laboro, por ke la ĉina skriba lingvo konformu al modernigo de Ĉinio. Dum nia interparolo li subite stariĝis el la sofo, tenis min je la

mano kaj diris: "Eble mi ne povos ĉeesti la konferencon, ĉar mi sentas min senforta. Ŝajnas, ke mi jam konsumis mian tutan energion." Je tio mi stuporiĝis kaj diris al li: "Ne. Vi estas nur tre laca kaj devas bone ripozi. Tiam mi venos por akompani vin al la kunveno." Mi tute ne atendis, ke tio estis nia lasta renkontiĝo.

Tiujare nia Hujucz estis 90-jara. Por ĉiu homo 90 jaroj estas sufiĉe longa vivdaŭro. En siaj 90 jaroj Hujucz senlace batalis por la patrolando, por la paco, por la homaro, por la E-movado, por la disvastigo de kulturo, unuvorte, por la plej bela idealo de la homaro, li devis ripozi!

\* \* \* \* \*

Hujucz (1896-1986) vivis en reforma epoko plena ne nur de malfaciloj kaj suferoj, sed ankaŭ de ĝojoj. Li pasigis siajn infanjarojn en imperiestra socio. Kiam li havis 15 jarojn, la imperiestra reĝimo estis anstataŭita de la respubliko. Kiam li plenkreskis, lia patrolando Ĉinio estis atencata de orienta kaj okcidentaj potencoj kaj preskaŭ koloniigis; kaj por regpotenco kaj propraj interesoj ĉinaj militaristoj batalis inter si, ke la ekonomia depresio pli kaj

pli gravis kaj la popolanoj pli kaj pli mizere vivis. Tamen intelektuloj estis serĉantaj la elirejon de la lando, de la popolo kaj de si mem. Fine la nefleksebla ĉina popolo stariĝis, lanĉis naci-liberigan militon kontraŭ la agresantoj kaj venkis. Poste fondiĝis la popola respubliko. Mezaĝa, Hujucz sin donis al la socialisma konstruado. La bela revo de la homaro, al kiu li sopiris, parte realiĝis.

Granda reforma epoko certe naskas giganton — diris iu okcidenta profeto, ĉar la epoko bezonas gigantojn. Hujucz ja estis giganto naskiĝinta en tia epoko. La historio multfoje pruvis, ke giganto de la reforma epoko ne nur estas erudicia, talenta kaj energio-plena, sed ankaŭ iniciatema.

Hujucz estis ĝuste tia homo.

\* \* \* \* \*

Post lia forpaso la ĉina popolo donis al li multajn titolojn, kiaj socia aktivulo (li klopodis por unuigi diversflankajn patriotojn kaj batalis por la sendependeco kaj liberigo de la ĉina nacio), ŝtata aktivulo (li estis vicprezidanto de la Ĉina Popola Kongreso), politikisto, diplomato, eldonisto, erudiciulo, analizisto pri internaciaj problemoj, juristo, verkisto, tra-

dukisto, filologo, fakulo pri reformado de la ĉina skriba lingvo kaj aktivulo de E-movado.


Li meritis ĉiujn tiujn titolojn. Laŭ mia kontakto kun tiu modesta giganto dum dekoj da jaroj, mi kredas, ke li plej ŝatus la lastan titolon: aktivulo de nia movado. Li estis la plej elstara propagandanto kaj organizanto de nia movado. Li meritis la titolon de unu el la plej kreivaj aktivuloj ne nur de Ĉinio, sed ankaŭ de la mondo. Li zorgis pri Esperanto kiam ajn kaj kie ajn. Li ĉiamaniere asociis Esperanton kun sia idealo kaj lerte uzis tiun lingvon en aktivadoj politika, socia, kultura kaj eduka, kiujn li entreprenis. Ja estas ne facile sukcesi en unu kampo, sed li en multaj sferoj progresigis la popolan movadon. Dum sia vivo li laboris silente. Nur post lia forpaso oni subite rimarkis, ke li lasis siajn spurojn en multaj kampoj, kiaj politika, diplomatia kaj kultura, tial oni pli komprenas lin, pli sopiras al li.

\* \* \* \* \*

De la fino de la pasinta jarcento ĝis la mezo de la 80-aj jaroj de tiu ĉi jarcento Hujucz travivis preskaŭ unu jarcenton. Li estis spirito de la jarcento. Per siaj nobla idealo, subluma personeco kaj malavara helpemo li altiris ĉirkaŭajn amikojn al la justa batalo por la komuna idealo. Ĉar li estis homama, oni volis proksimi-

ĝi al li kaj intelektuloj volis elverŝi sian koron al li. Eble tio estis homaranismo iniciatita de L.L. Zamenhof.

Ne estas troige diri, ke Hujucz havis sennombrajn amikojn en kaj eksterlande. Dum sia vizitado



Junie de 1940 s-ro Hujucz eklaboris en la redakcio de singapura ĵurnalo *Nanyang Shangbao*.

al kamparo en la maljuneco li konatiĝis kaj amikiĝis kun nemalmultaj kamparanoj. La amikeco inter li, Lusin kaj Eroŝenko estis bona ekzemplo. Lusin, granda ĉina verkisto kaj pensulo, reprezentanto de la progresemaĵoj intelektuloj, iam laboris kiel rektoro de mezlernejo, kie lernis Hujucz. Kiam Lusin instruis en Beiping (Pekino), Hujucz akceptis en Ŝanhajo Eroŝenkon, blindan rusan poeton elpelitan de la japana registaro. Ĉar Eroŝenko volis serĉi novan pensfluan en

Pekino, Hujucz rekomendis lin al Lusin, dank' al kies helpo li komencis instrui Esperanton kaj la rusan literaturon en la Pekina Universitato. Tiel naskiĝis profunda amikeco inter Lusin kaj Eroŝenko. Pro tio Lusin verkis faman novelon "La Komedio de la Anasoj" kaj ĉinigis liajn plurajn verkojn.

Eterna estis ankaŭ la amikeco inter Hujucz kaj Eroŝenko. Hujucz ne nur tradukis liajn verkaĵojn, sed ankaŭ petis la Komercan Presejon, la plej grandan kaj faman en Ĉinio, eldoni lian tradukon de "Rakontoj de Velkinta Folio" verkita de Eroŝenko. Hujucz aperigis ankaŭ artikolon por konigi la blindan poeton en la vaste legata "Orienta Kuriero" redaktata kaj eldonata de tiu presejo. Je la nomo de la Ŝanhaja E-Asocio Hujucz eldonis la libron "Turo por Fali" en Esperanto originale verkita de Eroŝenko.

Post la malsukceso de la ĉina revolucio en 1927 Lusin ekloĝis en Ŝanhajo. Kaj la amikeco inter Hujucz kaj Lusin kreskis tagon post tago. Lusin aligis Hujucz al la Ĉina Ligo por Defendo de Civilaj Rajtoj, fama organizo de progresemaĵoj personoj en la 30-aj jaroj por savi tiujn, kiujn persekutis la reakciuloj. En ĝi laboris Song Qingling (Song Ĉingling), Cai Yuanpei, Lusin kaj aliaj famuloj en la politika kaj kultura rondoj. Malfeliĉe, Lusin forpasis en oktobro 1936. Dank' al la klo-

En 1956 s-ro Hujucz kun ĉina delegacio partoprenis festadon de la 1-a de majo en Sovetunio. En la foto s-ro Hujucz levas la ĉapelon en signo de saluto.



S-ro Hujucz (meze de la fronto) kaj Dortmundaj s-anoj en januaro 1931




Ĉina vicĉefministro Chen Yi (maldekstre) kaj s-ro Hujucz (la dua de maldekstre) en la Unua Ĉina Esperanta Labor-kunveno en Pekino en 1963





S-ro Hujucz (la tria de maldekstre en la fronto) en la Dua Ĉina Esperanta Labor-kunveno, aŭguste de 1979



S-ro Hujucz (dekstre) kaj veterana esperantisto Tikos en la 30-jara Jubileo de EPC

Foto de **JIANG QISHENG**



S-ro Hujucz (la tria de maldekstre) kun Bingxin (maldekstre), fama verkistino; Rong Yiren (la dua de maldekstre), fama entreprenisto; Hu Zi'ang (la dua de dekstre), vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco; kaj Hua Luogeng (dekstre), fama matematikisto, antaŭ sia loĝejo en Pekino



En 1974 s-ro Hujucz (la tria de maldekstre) kun japanaj s-anoj Toida Naoki (la kvara de maldekstre) kaj Isobe Jukiko (la dua de dekstre). La unua de dekstre estas la aŭtoro.

podo de Hujucz k.a. okazis senprecedenca procesio de funebrantoj, kiu fariĝis manifestacio de la ĉina nacio kontraŭ la japana militarismo. Miloj kaj miloj da popolanoj funebre akompanis la ĉerkon de Lusin, kovritan per flago kun vortoj "Nacia Spirito", al tombejo de Ŝanhajo. La procesio montris, ke la ĉina nacio estas nesubigebla kaj la ĉina nacio starigos finfine. Unu jaron poste, okazis en Ĉinio milito kontraŭ la agresantoj. Hujucz bone konservis kaj diskonigis verkojn de Lusin, por ke ili ne perdiĝu dum la milito. En Ŝanhajo ĉirkaŭita de la japanaj agresantoj, Hujucz kompilis kaj eldonis "Noveloj de Lusin" (plena kolekto) el 20 volumoj, kio ne eblis eĉ por la plej fortaj eldonistoj en tiu situacio. Tamen Hujucz rapide kolektis sufiĉe da mono kaj paperoj, dank' al siaj amikoj en la presa, kultura, industria kaj komerca rondo de Ŝanhajo. En nur kelkaj monatoj eldoniĝis la libro. El tio videblis ankaŭ la forto de la granda amikeco inter Hujucz kaj liaj amikoj.

Hujucz, kiel Prometeo, akiris sanktan fajron, lumigis al ni la vojon kaj varmigis nian koron en ege malfacila kaj obskura periodo. Ekz. dum la kultura revolucio

Hujucz ĉiam helpis tiujn, kiuj suferis de maljusta traktado. Kiam Mao Dun, granda verkisto de Ĉinio, estis miskulpigita, Hujucz kuraĝis viziti lin kaj elpaŝis por solvi liajn malfacilojn. Plej kortuŝe estis, ke kiam granda literaturisto Feng Xuefeng (Feng Ŝjuefeng) estis kruele persekutata kaj turmentata de kancero, nur Hujucz kuraĝis vizitadi lin por doni al li konsolon. Post la forpaso de Feng Xuefeng Hujucz klopodis okazigi ceremonion por lin adiaŭi.

\*\*\*\*\*

Hujucz estis enkorpiĝo de la spirito de Esperanto. En Ĉinio lia nomo signifis Esperanton. Dum 73 jaroj post kiam li eklernis Esperanton en 1913, lia koro estis neniam for de Esperanto. Li altiris multajn intelektulojn al lernado kaj subteno de Esperanto. Unu el ili estis Bakin, granda verkisto de Ĉinio. Li diris, ke Hujucz estis lia voĝvidanto. En la 20-aj jaroj Hujucz kaj Bakin kune restarigis la Ŝanhajan E-Asocion. Komence de la 30-aj jaroj Hujucz, Ŝelezo kaj aliaj samideanoj fondis la Ŝanhajan Esperantistan Ligon, kiu fariĝis poste centro de la pro-

gresema E-movado de Ĉinio. Laŭ propono de Hujucz oni elmetis la sloganon: "Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio". Inspirite de la slogano, miloj kaj miloj da gejunuloj partoprenis en la naci-sava batalo kaj samtempe akcelis la Esperantan movadon.

En 1951 Hujucz iniciatis la Ĉinan E-Ligon. Dum sia studado en Francio li partoprenis la 20-an kaj 22-an UK respektive en 1928 kaj 1930. Li multe klopodis por okazigi la 71-an UK en Pekino, sed bedaŭrinde, li ne povis ĉeesti ĝin. Li laciĝis kaj devis ripozi. Li foriris, mi pensas, sen granda bedaŭro, ĉar en Ĉinio vigliĝis multaj junaj esperantistoj. Li estu trankvila. Kvankam li dormas por ĉiam en alia mondo, tamen li vivos eterne en nia koro kiel spirito de la epoko.

\*\*\*\*\*

Antaŭ 60 jaroj Hujucz elesperantigis multajn novelojn plejparte de subpremataj nacioj. Li titolis sian libron "Fajrero". Kia bela fajrero! Sola fajrero povas bruligi la tutan stepon, lumigi nian vojon, gvidi nin al bela estonteco, al ideala loko...



QIU CUNSHUANG:

# Estro de subprovinco



S-ro Yao Maosen

“**L**I estas en kamparo.” “Li estas en la forstejo.” “Li iris viziti alilandan komerciston.” Ĉiufoje tiajn respondojn mi ricevis, kiam mi telefonis al s-ro Yao Maosen, eĉ en la 9-a aŭ 10-a horo nokte.

Certe li estas okupita. Multegaj problemoj atendas solvon de li, estro de la Qiandongnan-a Mjaŭ-a kaj Dong-a Aŭtonoma Subprovinco (Qiandongnan ĉinlingve signifas sudorienton de Guizhou-provinco). La subprovinco izolate situas, kun nacimalplimultanoj konsistigantaj 75% de ĝiaj loĝantoj. Por ne paroli pri aliaj aferoj, sole la tasko satigi 3.8 milionojn da loĝantoj jam ĉagrenis lin. Cetere, en montaro pli ol 800 000 homoj vivas ankoraŭ malriĉe.

Pro tio, kvin jarojn antaŭe, kiam s-ro Yao estis elektita kiel estro de la subprovinco, li prenis grenan produkton kiel la plej urĝan taskon. Li diris: “Stabila rikolto de greno signifas trankviligon de popolo.” Tamen estas malfacile rikolti stabile kaj multe por tiu loko kun malfavora cirkonstanco kaj postiginta kultiv-maniero. S-ro Yao Maosen, deveninta de montvilaĝa dong-familio kaj diplomiginta el agronomia instituto, klare sciis, ke nur scienca kultivado venigos altan rikolton. Du jarojn li gvidis eksperimenton pri rizhibridigo en la kamparo kaj disvastigis sian

sperton en la subprovinco, kiu havas pli ol 60 000 hektarojn da rizkampoj. Dank’ al lia penado, tie la hektara produktokvanto de rizo atingis 8 520 kilogramojn. La pokapa posedkvanto de greno kreskis de 250 al 300 kilogramoj.

Solvinte la problemon de greno, s-ro Yao ekkonsideris pliriĉigon de la kamparanoj. Li opiniis, ke en la subprovinco abundaj riĉfontoj estas ekspluateblaj. Kune kun famaj ekonomikistoj li faris detalajn esplorojn pri grundo, klimato, termokvanto kaj aliaj kondiĉoj de la subprovinco. Poste li ellaboris planon: starigi 12 komercaĵajn bazojn de greno, fruktoj, rapidkreskaj arboj, uruŝioj, drogherboj, brutobredado kaj paŝtado.

Li planis por la estonteco: nun en la subprovinco ekspluatigis 300 000 hektaroj da rapidkreskaj arbaroj, kio helpas 50% da familioj de la subprovinco sin liberigi de malriĉeco. Estis plantitaj kaj plantotaj 70 000 hektaroj da uruŝioj, kio helpas 150 000 familiojn riĉiĝi. Krome, oni povas laŭ siaj propraj kondiĉoj planti drogherbojn aŭ fruktarbojn aŭ bredi brutojn por riĉiĝi. S-ro Yao diris, ke se la plano bone plenumiĝos, la subprovinco adiaŭos malriĉecon post du aŭ tri jaroj.

S-ro Yao esperas, ke pli multaj homoj venos investi. Kiel do venigi investantojn?

Oni rakontis al mi, ke en 1992

iu alilanda investanto serĉis en Ĉinio kunlaboranton por ekspluati bariton. Unu el liaj postuloj estas plenigi formalizaĵojn en duonmonato. S-ro Yao sciis, ke estas kvin konkurantoj pri tiu programo, kies kondiĉoj de riĉfontoj estas proksimaj. Por gajni la programon la ĉefa punkto estas kiel eble plej rapide plenigi ĉiujn formalizaĵojn. Li haste revenis en la subprovincon el la ĉefurbo de la provinco por prepari koncernajn dokumentojn. En la sesa tago, la investanto ricevis lian telefaksaĵon pri la formalizaĵoj kaj ĝojis pro tia rapideco. Dum la esplorado pri tiu subprovinco, oni opiniis, ke tie la barito kun rezervokvanto de pli ol 600 milionoj da tunoj taŭgas por ekspluati. La alilanda investanto finfine decidis kunlabori kun s-ro Yao. Nun en la subprovinco funkcias 33 entreprenoj administrataj aŭ investitaj kune de en- kaj eksterlandanoj.

Ĉi-jare s-ro Yao Maosen finos sian kvinjaran laboron kiel estro de subprovinco. Ankoraŭ multaj laboroj atendas lin. Li pensis, ke li multe ŝuldas kaj al siaj familianoj kaj al si mem, ĉar li estas tiel okupita, ke li ne havas tempon por akompani ilin aŭ por iomete ripozi. Kaj la popolanoj de la subprovinco kompreneble esperas, ke li daŭre restos sur sia posteno por la ekonomia disvolviĝo de la subprovinco. ■

# Hongkong iras al 1997

de DONG ZHU



**P**ETATE de niaj legantoj, al la 8-a numero de EPC mi verkis la artikolon “Pri la Origino de la Hongkong-a Problemo”, kiu ĉefe temas, kiel Hongkong estis devigite koncesiita al Britio post la Opia Milito. Daŭrigante la temon, ĉi artikolo konigas, kiel statas nun Hongkong kaj kiujn politikojn Ĉinio praktikos por efektiviĝi paca transiron de Hongkong kaj teni ties stabilecon kaj prosperon, post kiam Ĉinio restarigos sian suverenecon super Hongkong en 1997.

## HONGKONG HODIAŬ

Hongkong havas areon de pli ol 1 000 kvadrataj kilometroj kaj 6

milionojn da loĝantoj. Profitante de sia favora situo en Azio kaj Pacifiko, kie impete kreskas ekonomio, kaj estante trairejo al la interna merkato de Ĉinio, Hongkong fariĝis rimarkinda komerca centro de Azio kaj ĝia ekonomio kaj komerco rapide disvolviĝis precipe post la 70-aj jaroj. Ĝia komerca valoro okupas la okan lokon de la mondo.

Hongkong estas unu el la tri bone naturdotitaj havenoj en la mondo. En 1994 ĝi fariĝis la unua haveno en la mondo, kies jara ŝarĝmaŝarĝa kvanto superis 10 milionojn da 20-futaj konteneroj. Ĝi estas ankaŭ grava fabrika centro en la mondo. Post la Dua Mondmilito, precipe en la komenco de la

50-aj jaroj, kun ŝanĝiĝo de la monda ekonomia strukturo Hongkong fariĝis tekstil-industria centro en la mondo kaj poste tie ekprosperis ankaŭ la industrioj de plasto, ludiloj kaj elektroniko. En la 70-aj jaroj Hongkong produktis ĉefe elektronikajn pecojn. En la lastaj 10 jaroj tie floris la servaj establoj kaj la terciara industrio fariĝis la ĉefa parto de ĝia ekonomio.

Krome, Hongkong estas ankaŭ la internacia financa centro. 81 el la cent grandaj bankoj sur la terglobo tie havas sian filion aŭ agentejon, nemalmultaj el ili prenis Hongkong kiel sian regionan ĉefstabejon. Hongkong, kiel grava azia centro de konsorcia kredito kaj or-negoco, estas unu el la ĉefaj

valutaj merkatoj de la mondo.

## “UNU LANDO KAJ DU SISTEMOJ”

Hongkong trapasis longan vojon por fariĝi la nuna prospera urbo. La ĉina registaro bone scias, ke la ĉeftero de Ĉinio kaj Hongkong disiĝis jam antaŭ pli ol 100 jaroj kaj ili praktikas tute malsamajn sociajn politikojn. Kiel do efektiviĝos paca transiro de Hongkong? Kun proksimiĝo de 1997 Deng Xiaoping, iama gvidanto de la Ĉina Popola Respubliko, elmetis la politikon de “unu lando kaj du sistemoj” por Hongkong, montrante ĝustan direkton por solvi la hongkong-an problemon. Tio signifas, ke kiam venos la tempo, kiam la ĉina registaro restarigos sian suverenecon super Hongkong en 1997, ne ŝanĝiĝos la socialisma politika sistemo nun efektivigata de la Ĉina Popola Respubliko, dum Hongkong daŭre praktikos kapitalismon.

Post 22 intertraktoj de julio 1983 ĝis septembro 1984 delegacioj de Ĉinio kaj Britio atingis interkonsenton kaj en la 19-a de decembro 1984 oficiale subskribis en Pekino “La Komuna Deklaracio de la Problemo pri Hongkong Farita de la Registaroj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Unuiginta Reĝlando de la Granda Britio kaj Norda Irlando”. La komuna deklaracio klare difinas: “La registaro de la Ĉina Popola Respubliko restarigos sian suverenecon super Hongkong en la 1-a de julio 1997 kaj Britio tiutage redonos Hongkong al Ĉinio”. Tiam Ĉinio instalos la Specialan Administran Regionon Hongkong rekte sub la Centra Popola Registaro. En 1990 Ĉinio publikigis “La Fundamenta Leĝo pri la Speciala Administra Regiono Hongkong”, kiu difinis la politikon de Ĉinio pri “unu lando kaj du sistemoj” por Hongkong, la politiko validos por 50 jaroj. Post 50 jaroj la politiko restos senŝanĝa, se ĝi utilis kaj al la ĉeftero de Ĉinio kaj al Hongkong. Kial la ĉina registaro prenas tiun politikon?

Unue, la totala komerca valoro

inter la ĉeftero de Ĉinio kaj Hongkong superis jare 50 miliardojn da usonaj dolaroj. Kompreneble tio estas reciproke utila kaj favora. Hongkong importis grandan kvanton da malaltprezaj krudaj materialoj, ĉiutagaj bezonaĵoj, manĝaĵoj kaj laborfortoj el la landinterno, kio malaltigis la produktokostojn kaj fortigis konkurencpovon de la produktoj en la internacia merkato. En la lastaj jaroj sole en la Delto de Perlo-rivero de Guangdong-provinco ĉiutage estas 2 milionoj da homoj, kiuj faras prilaboradon por hongkong-aj fabrikoj. Pere de Hongkong Ĉinio enkondukas kapitalon, fakulojn kaj avangardajn sciencojn kaj teknikojn de la okcidento.

Due, la ĉeftero de Ĉinio liveras grandan latentan merkaton por Hongkong. Dank’ al la favoraj kondiĉoj de geografio, homaj interrilatoj, lingvoj k.a. Hongkong estas ideala saltotabulo por la okcidentaj landoj eniri en la ĉinan merkaton kaj ankaŭ ideala elirejo por ĉinaj komercaĵoj al la okcidentaj merkatoj.

Krome, la politiko de “unu lando kaj du sistemoj” por Hongkong ankaŭ validos por solvi la problemojn de Aomen kaj Taiwan. La praktiko de “unu lando kaj du sistemoj” absolute ne estas portempa, sed longtempa politiko de Ĉinio.

## HONGKONG ADMINISTRATA DE LA LOKANOJ

La Speciala Administra Regiono Hongkong havos plenan aŭtonomecon en administrado, escepte de la rajtoj de la nacidefendo kaj eksteraj aferoj, kiujn decidos la Centra Popola Registaro. Ekz., Hongkong povos mem ellabori siajn sistemojn kaj politikojn pri valuto kaj financo por garantii la administran liberecon de la financaj entreprenoj kaj merkato; la valuto de Hongkong povos esti daŭre uzata kaj libere ŝanĝata kontraŭ alilanda mono. La bankoj, kiuj emisias hongkong-ajn dolarojn, povos daŭre emisii ilin post 1997; Ĉinio ne kontrolos la interŝanĝon de alilandaj valutoj en

Hongkong kaj la merkatoj pri alilandaj valutoj, oro, valorpapiroj k.a. estos daŭre malfermitaj, por ke la kapitaloj cirkulu libere; post 1997 Hongkong daŭre estos libera havenurbo. Escepte de cigaredo, vino, kosmetikaĵo kaj benzino, ĉiuj alilandaj varoj estos fri dogano kaj povos daŭre vendiĝi je malpli altaj prezoj en Hongkong ol en siaj propraj landoj.


Ĉiuj leĝoj de Hongkong validos daŭre, se nur ili ne estos kontraŭaj al la “fundamenta leĝo”. Hongkong estos finance memstara. La Centra Registaro neniom impostos al ĝi kaj donos al ĝi certan rajton en la eksteraj aferoj. Ĝi povos aliĝi al internaciaj organizoj kaj partopreni kunvenojn kaj teni rilatojn ekonomian, komercan, financon, navigan, telekomunan, turisman, kulturalan, sportan k.a. kun aliaj landoj, regionoj kaj koncernaj organizoj, subskribi kaj plenumi interkonsentojn. Hongkong povos, kiel aparta dogan-regiono, aniĝi al la Internacia Komerca Organizo k.a.

Post restarigo de la suvereneco de Ĉinio super Hongkong la land-internaj loĝantoj estos daŭre limititaj por eniri en Hongkong, por ne pliigi ĝian troloĝatecon kaj teni ĝian aŭtonomecon.

La ĉina popolo atendas rekuniĝon kun la samlandanoj de Hongkong kaj deziras al Hongkong plian prosperon. ■



# Senlaca semanto de Esperanto



S-ro Lee Jung-Kee

**E**N la centro de la movoplana Seulo, ĉefurbo de Koreio, ekzistas kvieta oazo — Seula Esperanto-Kulturcentro. Ĝia mastro estas fama korea esperantisto Lee Jung-Kee.

S-ro Lee estas 44-jara. Antaŭ 26 jaroj li eklernis Esperanton. En 1982 li estis elektita kiel ĝenerala sekretario de la Korea Esperanto-Asocio. Ni ekhavis kontakton en 1989, antaŭ la starigo de diplomataj rilatoj inter Ĉinio kaj Koreio. Mi, kiel la

unua ĉina esperantisto, kiu gastis en Koreio, estis varme akceptita. Akompanate de s-ro Lee, mi akceptis intervjuon de raportisto, renkontiĝis kun koreaj e-istoj, vizitis Esperantajn grupojn kaj partoprenis en Esperanto-kongreso de Koreio. Same, li estis unu el la unuaj koreaj esperantistoj-gastoj en Ĉinio. Li ofte rememoris la 71-an UK en Pekino. Komuna idealo tuj faris nin intimaj amikoj. Li gastigis min en sia hejmo. Li esperis, ke esperantistoj de la du landoj kontaktiĝos ofte por akceli la

azian E-movadon.

En 1990 s-ro Lee forlasis la postenon de ĝenerala sekretario kaj starigis la Librejon Gaja kun aliaj du esperantistoj por vendi Esperantajn librojn kaj gazetojn. Ĉar malprosperis la librejo, tiuj du esperantistoj foriris. Sed s-ro Lee restis. Li diris: "La librejo estas loko por koreaj esperantistoj aĉeti librojn kaj renkontiĝi. Eĉ se mi neprofitas, mi tamen devas daŭrigi la aferon." Li ordigis la librojn, translokis la librejon al la urbocentro kaj ŝanĝis ĝian nomon en Seulan Esperanto-Kulturcentron. Por ŝpari monon, li dungis neniun. Matene li laboras en asekura kompanio, posttagmeze akceptas vizitantojn en la kulturcentro, sendas librojn kaj gazetojn, kaj vespere instruas en Esperanta kurso. Li ofte revenas hejmen je la 23-a. En lia 30-kvadratmetra ĉambro estas stako da Esperantaj libroj, gazetoj, kasedoj, videobendoj kaj memoraĵoj.

Ĉiutage koreaj esperantistoj venas por aĉeti librojn, legi aŭ lerni Esperanton, ankaŭ alilandaj esperantistoj venas por viziti. En novembro 1995 mi renkontis tie esperantiston el Taĝikistano.

Por propagandi Esperanton, s-ro Lee funkciigas elementan kurson ĉiumonate. Dum la pasintaj 4 jaroj funkciis jam 46 kursoj, en kiuj lernis pli ol 360 personoj. Iuj daŭrigis studadon en progresiga kurso. Mi miris, ke lernantoj, kiuj lernis nur 3 monatojn, jam povas flue paroli kun mi. Mi demandis s-ron Lee pri la kialo, kaj li respondis: "Ĉar ili estas tre saĝaj." Fakte, por instrui ilin, li multe cerbumis. En la lecionoj li parolis kiel eble plej ofte en Esperanto, rekomendis al ili aŭskulti Esperantan programeron de la Ĉina Radio Internacia, interparoligis ilin kun alilandaj esperantistoj. Tio ne nur interesis la lernantojn kaj vigligis la lecionojn, sed ankaŭ levis ilian parolnivelon. Li partoprenigis siajn lernantojn en Esperanta renkontiĝo ĉiusabate, ke multaj el ili iom post iom enamiĝis al Esperanto.

S-ro Lee estas ankaŭ radio-amatoro. Li ofte ricevis vokojn de aliaj. Li rimarkis, ke ekzistas multaj radio-amatoroj. Li decidis rekomendi Esperanton al ili. Kiam aliaj vokis lin, li energie propagandis Esperanton al ili, kuraĝigis ilin lerni kaj uzi ĝin. Dank' al li, 73 radio-amatoroj fariĝis esperantistoj.

Kiam mi demandis lin, kial li insistis pri la kulturcentro, kvankam ĝi ne profitis, li respondis: "Multe da miaj amikoj persvadis min forlasi ĝin,



S-ro Lee Jung-Kee (dekstre) kun samideanoj el Taĝikistano kaj Ĉinio

sed mi rifuzis, ĉar mi estas esperantisto kaj paco, amikeco kaj progreso estas nia idealo. Por efektiviĝi la idealon, mi volonte tion faras." Li diris ankaŭ: "Nun Esperanto-movado en Azio estas neforta, ni, koreaj kaj ĉinaj esperantistoj, devas multe klopodi."

Kia respektinda esperantisto! Se ni ĉiuj tiel faras, nia Esperanta ĝardeno ĉiam prosperos. ■

---

## Plej vivovera pentraĵo (Humuraĵo)

En la antikva tempo iu gasto pentris por la reĝo de Qi-regno.

"Kio estas la plej malfacila por pentri?" demandis la reĝo.

"Pentri hundon kaj ĉevalon estas plej malfacile, ĉar oni bone konas ilin, kiuj vivas inter la homoj, kaj mi ne povas pentri ilin vivoveraj," respondis la gasto.

"Kion do vi plej facile pentras?"

"Fantomon, ĉar neniuj ĝin vidis, kaj mi povas pentri ĝin laŭ mia imago."

## ESP-NOVAĴOJ

● La 16-an de majo 1996 iris interesa leciono de Esperanto en la Pekina 101-a Mezlernejo. 26 kursanoj prezentis al la vizitantoj respondecojn kaj instruistoj programerojn en Esperanto: Esperantaj kantoj, voĉlegado de Esperantaj tekstoj kaj rakontado en Esperanto laŭ bildoj. S-ino Li Yuping, parolistino de E-sekcio de la Ĉina Radio Internacia, gvidis la kurson. Poste oni diskutis pri la utileco de Esperanto. La kurson organizis la E-Asocio de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Julie la kursanoj partoprenis la internacian someran semajnon por geknaboj okazintan en Pekino. (Sun Aijun)



S-ro Verda Dian (dekstre) intervjuata

● Dank' al gazetara raporto de la Esperanta ŝako kreita de Verda Dian, esperantisto de Chengdu, Sichuan-provinco, estas vaste ŝatata. Ĝiaj ŝakpecoj similas al tiuj de la ĉina ŝako kaj ĝia ludmaniero estas malsama ol tiu de la lasta. Ĉiu ĝia ŝakpeco portas nomon en Esperanto. Dank' al la plurjara klopodo de Verda Dian, la Esperanta ŝako estas ludata ankaŭ de samideanoj de aliaj landoj.

● La 19-an de aprilo ekfunkciis la Lŭchuan-a Librejo en Shenyang, Liaoning-provinco.

Ĝia fondinto estas s-ano Li Liang kaj ĝi vendas eldonaĵojn ĉefe en Esperanto, en la angla kaj japana lingvoj.

● En la 5-a, 17-a kaj 18-a de aprilo, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis poŝtmarkoseriojn "Elektitaj Pentraĵoj de Huang Binhong", "Aviadiloj Faritaj de Ĉinio" kaj "Pejzaĝoj Miniaturaj". En la emisiataj tagoj la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis memorigajn poŝtstampilojn respektive en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linjui).



● Antaŭ nelonge la esperantistoj en bulgara urbo Polski Trambeŝ celebris la 80-jariĝon de la veterano Hristo Manolov. Aŭtoro de E-lerniloj, iama redaktoro de internacia junulara E-gazeto, agitanto kaj lektoro dum multaj jardekoj, s-ro Manolov daŭre staras sur sia posteno, vigla kaj optimisma.

Lastatempe la loka klubo ricevis lian testamenton — valoran bibliotekon, inkl. lernilojn por 16 lingvoj.

En septembro ĉi-jare okazos en la urbo festeno kun en- kaj eksterlanda ĉeestantaro. Salutoj kaj ekspoziciaj materialoj estas dankeme akceptotaj. La adreso: Borislav Borisov, Esperanto, PK 61, 5180 Polski Trambeŝ, Bulgario

● Dum la 2-a Kuba Esperanto-Kongreso en marto 1996 prelegis Alex Humet el Belgio pri sanigado per spiritaĵoj laŭ la instruo de Bruno Groning. Raportis jam pri propra sanigo du kubaj esperantistoj. En Havano kaj en Santiago de Kubo esperantistoj aranĝis kromajn informprelegojn en la hispana lingvo. La rezulto estas, ke 40 esperantistoj kaj 25 neesperantistoj el 10 urboj aniĝis al la Amikaro Bruno Groning. Sinjorino Grete Hausler, gvidantino de la tuta amikaro kun 25 000 amikoj, dum sekvantaj printempaj kunvenegoj en Germanio kaptis la okazon por substreki la gravecon de Esperanto kaj instigis la lernadon de ĝi. (Detlef Meier)

● Murkalendaro '97, kiu aperos venontjare en Olŝtino (Pollando) enhavos karikaturajn de olŝtinaj eminentuloj — prezidantoj, urbestroj, aktoroj, direktoroj kaj profesoroj. Inter ili aperos ankaŭ karikaturaj de sinjorino Maria Nawrocka, kiu gajnis ĉefpremion (ĉ. USD 600.-) en Granda Kvizo dum la lasta Freŝo... Se vi volus gajni premion de Freŝo '96 (por havi propran monon por somerferioj)... se vi volus havi propran artan karikaturon... se vi volus konatiĝi kun olŝtinaj geesperantistoj... kaj olŝtinaj ĉirkaŭaĵoj... informiĝu ĉe: S-ro Andrzej Gielert, Skrytka 861, Murzynowskiego 22/27, Olsztyn, Pollando.

(Marian Zdankowski)

# Hirundoj kaj paseroj

de JOZEFO KRISTIÁN (Slovakio)

**H**IRUNDOJ kaj paseroj estas ĉarmaj birdoj, el inter kiuj tamen la hirundoj havas pli grandan favoron ol la paseroj miaopinie tial, ĉar la paseroj ne alportas tiom da utiloj kiom la hirundoj.

Hirundoj apartenas al migraj birdoj, kiuj prin-tempe forlasas la afrikan kontinenton kaj vizitadas Eŭropon, kie ili restas ĝis meze de septembro. En Eŭropo ili trovas la plej bonajn kondiĉojn por reprodukti la rason, konstruas nestojn kaj kovas idojn. Do, ilia patrujo estas Eŭropo kaj ne Afriko, kiu servas al ili nur per transira loĝloko dum aŭtuno kaj vintro.

Aŭtune la hirundoj komencas sin grupigi sur metalfadenoj de elektraj kondukiloj kaj tie atendas la momenton, kiam la plej aĝa kaj rekonata "direktisto" suprenflugas montrante la ĝustan direkton al la afrika kontinento. Tiam amaso da hirundoj el ĉiuj vilaĝoj grupiĝas farante kvazaŭ "nigran nubon" kaj antaŭ la sunsubiro komencas la kelkmil-kilometran flugon.

Septembre ankaŭ la nova generacio de hirundoj forlasas siajn nestojn kaj are forflugas al ĝis nun nekonata nova, sed ĉiam verda medio. Atendas ilin longa flugado plena de diversaj danĝeroj, sed la raskonserva instinkto estas tre forta, tial ili venkas la barojn. Flugante super la Meza Maro, ili foje-foje vidas ŝipojn, kiuj servas al laciĝintaj hirundoj kiel ripozejo. Kompreneble, maristoj timas ankaŭ atakon de miloj da hirundoj, kiuj povas kaŭzi malagrablaĵojn, eĉ gravajn katastrofojn. Multfoje la maristoj devas balai maren la ripozantajn kaj lacajn hirundojn de sur la ferdeko, ĉar la ŝipo estas troŝarĝita kaj la navigacio fariĝas preskaŭ nebla.

Dum mia infanaĝo mi tre ŝatis atenti la hirundojn, kiam ili kaptadis muŝojn flugantajn en la aero aŭ sidantajn sur la muro de la domo, kie la muŝoj sin sunbanis. Fulmrapide ili kaptis la muŝojn kaj alportis ilin por nutri siajn idojn elkovitajn en kot-nesto.

Hirundoj konstruas siajn nestojn precipe sub tegmentoj de la domoj en vilaĝoj, ĉar la vilaĝo certigas pli kvietajn vivkondiĉojn ol la brua medio de la urboj. Estas interese, ke alflugante Eŭropon, ili tuj trovas siajn nestojn en vilaĝoj kaj sur la muroj de la domoj, kie ili ekkovis siajn idojn. Nature, la alflu-

gantaj junaj hirundoj komencas konstrui novajn nestojn, por ke ankaŭ ili povu certigi la vivtenon de sia raso. La nova paro kutime komencas konstrui sian neston apud la malnova nesto, tial ekzistas domoj, sub kies tegmento oni vidas eĉ 4-5 nestojn. Bedaŭrinde, ne ĉiuj vilaĝanoj amas la hirundnestojn sub tegmento de sia domo, ĉar dum la nutrado de idoj estiĝas multe da fekaĵo, kio fariĝas malagrabla vidaĵo. La lertaj dommastroj lokas sub la nestoj konvenan lignotablon, por ke la fekaĵo ne malbeligu la ĉirkaŭaĵon de la domo.

Hirundoj konstruas siajn nestojn el koto. Konstrui neston estas benediktana laboro, ĉar en siaj bekoj ili povas alporti nur etan kvanton da koto, malgraŭ tio ili tre diligente portadas la koton, kiun ili akiradas rande de la marĉetoj, troveblaj apud la vojoj. Nestokonstruo daŭras kelktage, ĉar prin-temfine kaj somerkomence la temperaturo atingas 25°-28°C, kiam la koto jam sufiĉe rapide sekiga. La novan neston la juna hirundparo remburas per mola lanugo, por ke la hirundidoj ripozu kviete kaj povu senĝene kreski.

Ankaŭ la paseroj estas el certa vidpunkto utilaj birdetoj, sed ilian utilecon mi nun ne ŝatus ekspliki. Pri ili mi skribas nur tial, ĉar ili estas iom pli trudiĝemaj kaj impertinentaj ol aliaj birdoj, ĉar ili pretas okupi la forlasitajn nestojn de la hirundoj, post kiam ili forflugis Afrikon. Estas sciate, ke por ili estas pli oportune enloĝiĝi en malpropra nesto, ol konstrui sian inter la branĉoj de arbustejo aŭ en la fumtuboj de la domoj.

Ĉiuj hirundoj alflugantaj el Afriko precize trovas la vilaĝon, la domon kaj sian propran neston, kiun ili pasintjare aŭtune forlasis. Foje-refoje ili konstatas, ke ilian neston okupis nedezirinda "personeco", kiu malgraŭ la ofta "alvoko" ne pretas forlasi la okupitan neston. La nedezirinda persono estas la pasero, kiu obstine rebatas per sia beko la "atakantan" hirundon. Post kelktaga "batalo" la hirundoj masonfermas la aperturon de la nesto kaj la pasero estas kondamnita je mortpuno, ĉar la nesto fariĝas netrapetrebbla por la aero, tial la pasero sufokiĝas. La hirundparo rapide konstruas novan neston por ekkovi siajn idojn. ■



# Instruado de la ĉina komuna parollingvo surbaze de Esperanto

## — Rakonto pri unika eksperimento

de VILHELMO ROWE (Britio)


“**M**I deziras lerni la ĉinan lingvon. Ĉu vi povus instrui ĝin al mi?” Per tiu subita peto mia 12-jara filo, Karlo, ja surprizis min. Sed mi klarigu iomete.

Mi estas dumviva amanto de lingvoj kaj mem okupigis tiutempe en lernado de la ĉina lingvo ĝis relative alta nivelo. Karlo estis denaska esperantisto, kaj dekomence lia lingva evoluo estis do plimalpli sama en Esperanto kiel en la nin ĉirkaŭanta angla lingvo. Kun mi kaj kun niaj esperantistaj geamikoj li interparolis Esperante; kun ĉiuj aliaj, inkluzive de la patrino, angle.

Aŭdinte la peton de Karlo, mi dum kelkaj momentoj silentis por iom cerbumi. Unuflanke mi volis agi laŭ la deziro de Karlo kaj ebligi al li iom lerni la ĉinan. Aliflanke mi jam aŭdis avertojn, ke estas nekonsilinde, ke patro aŭ patrino provu roli kiel instruisto de la propra infano, ĉar la ĝusta rilato inter instruisto kaj lernanto estas tute malsimila, emocie kaj praktike, al tiu inter familianoj. Mi efektive timis, ke doni al Karlo lecionojn de la ĉina lingvo verŝajne fiaskus.

Post momento mi ekhavis ideon. Karlo iom lernu la ĉinan lingvon, sed anstataŭ doni lecionojn mi iniciatu parolan ludon.

Fine mi respondis la demandon de Karlo: “Jes, bone! Ni komencu tuj! Jam nun mi donas al vi unu ĉinan vorton: ‘hǎo’. Ĝi signifas ‘bona’, ‘esti bona’, aŭ ‘bone’, kaj ekde nun, ĉiufoje kiam vi bezonos diri al mi ‘bona’ aŭ ‘bone’, vi diru ‘hǎo’, kaj la ceterajn vortojn diru en Esperanto kiel kutime. Ankaŭ mi faros same.” Tiu ideo amuzis Karlon, kaj ni daŭrigis la konversacion, parolante pri diversaj aferoj. Iom petole ni ambaŭ elektis niajn diraĵojn tiel, ke ni ofte bezonu uzi la vorton “hǎo”.



La aŭtoro (maldekstre) kaj liaj filo kaj bofilino en Pekino en 1986

Tiutage, ĉiuj el niaj interparoloj tiel iris ĝis la noktigo.

La postan tagon mi instruis al Karlo la ĉinan vorton “nǐ” (= “vi” singulara). Ni do jam povis saluti unu la alian en la ĉina per “Nǐ hǎo!” (= “Saluton!”, aŭ pli laŭvorte “[Ĉe] vi estu bone!”), kaj cetera ni de tiam uzis la vorton “nǐ” ĉiufoje, kiam ni bezonis uzi singularan “vi”, sammaniere kiel ĉe la vorto “Hǎo”, ekzemple: “Ĉu nǐ kredas, ke tio estas hǎo ideo?” Estis interese konstati, ke konfuzo inter ĉina “nǐ” kaj Esperanta “ni” ne okazis, parte pro mia apoga uzo de mangestoj, sed ankaŭ ĉar mi skrupule atentis (kaj atentigis Karlon) pri la ĉinaj tonoj (karakterizaĵo de la ĉina fonetiko, por kiu cetera servas la supersignojn en alfabeto skribo). Karlo dekomence senĝene prononcis per la ĝustaj tonoj, kio forte kontribuis al evito de konfuzo inter la ĉina kaj Esperanta partoj de nia interparolado.

Tiel daŭris la afero, tagon post tago, sed mi kompreneble devis zorge plani ĝustatempan enkondukon de la diversaj aspektoj de ĉina sintakso, tiel ke nia interparolado ne nur vorte, sed ankaŭ gramatike, iĝu pli kaj pli ĉina. Feliĉe la reguleco de la Esperanta gramatiko kaj la senfleksia karaktero de la ĉina lingvo certigis, ke la afero sufiĉe glate antaŭeniru, kaj post 18 monatoj Karlo scipovis pli ol 500 el la plej oftaj ĉinaj vortoj kaj uzis interparole kun mi preskaŭ tute ĉinan sintakson. Praktike tio signifis, ke niaj konversacioj estis jam preskaŭ tute ĉinlingvaj, ĉar ni bezonis Esperanton nur por la relative maloftaj vortoj. Nelonge poste mi decidis proponi al Karlo jene (kaj laŭvorte): “Nǐ Hànyǔ yǐjīng shuōde hěn hǎo (= Vi jam parolas tre bone la ĉinan.) Senutile měitiān dōu aldoni yíge cí. (= Estas senutile aldoni ĉiutage unu vorton.) Cóng xiànzài qǐ, yàoshi nǐ xiǎng zhīdào ajna yíge cí Hànyǔ zěnme shuō, zhīyào nǐ wènyīwen, wǒ jiù gāosu nǐ. (= Ekde nun, se vi deziras scii, kiel oni



# *Altas la monto longas la vojo*

de WANG GUOZHEN

*la krio signifas eksplodan silenton  
silento senvoĉan alvoko-identon  
aŭ tondran jubilon  
aŭ mutan trankvilon  
mi petas  
nur ne banal-indiferenton*

*se la horizonto min vokas  
mi do iros al la horizonto  
se alta monto min vokas  
mi do iros al la alta monto  
se la piedoj frotvundiĝos  
do l' sun' vespera ruĝigu la aleon  
se la manoj sangos de pikiloj  
do la veproj floru kiel azaleoj*

*neniu vojo pli longas ol la plando  
neniu monto pli altas ol grimpanto*

# *Amego al la vivo*

de WANG GUOZHEN

*mi ne zorgos ĉu mi sukcesos  
se mi elektis lontanen foron  
do mi marŝos spit tempest' sen ĉeso*

*mi ne zorgos pri gajna promeso  
se mia kor' inklinas al rozo  
do mi kuraĝe malkaŝos mian koron*

*mi ne zorgos pri atak' de ŝtormo en l' estonto  
se mia elektita celo estas la horizonto  
do mi la dorson turnos al la mondo*

*mi ne zorgos ĉu la voj' ebenos aŭ kotplenos en  
futuro  
se mi l' vivon amegas  
do ĉio estas en kalkulo.*

Elĉinigis Laŭlum

diras ĉine ajnan vorton, demandu nur, kaj mi sciigos al vi.)" Ankaŭ mi miavice ĉesis uzi Esperantajn vortojn (krom se mi ne sciis, kiel diri tion ĉine!), kaj diris al Karlo ke, se li aŭdos nekomprenatan ĉinan vorton, li demandu (kompreneble ĉine), kion ĝi signifas.

Ni daŭrigis tiel dum pluaj kelkaj jaroj, ĝis la foriro de Karlo el la gepatra hejmo.

\* \* \* \* \*

Jam pasis 28 jaroj de kiam komenciĝis nia lingva

eksperimento, kiu sendube estis kaj restas unika okazaĵo en la tuta historio de la homa parolkapablo! Estas notinde, ke kontraste al tio, kio okazas en ortodoksa lernado de fremda lingvo, dum la tuta disvolviĝo de nia eksperimento Karlo parolis tute flue unue kiel indiĝeno de Esperantio, poste kiel indiĝeno de "Esperĉinio", kaj fine preskaŭ kiel indiĝeno de Ĉinio! Pro sia multa posta vojaĝado, precipe en la Oriento inkluzive de Ĉinio, Karlo jam trovis utile scipovi la ĉinan komunan parollingvon, kaj tio certe multe helpis al li poste kleriĝi ankaŭ pri la japana. ■


# Ĉinaj emeritoj

Fotoj de ZHAO XI

Nun en Ĉinio vivas cent milionoj da pli-ol-66-jaruloj. Dank' al la stabila kaj senĉese pliboniĝanta vivo, ilia meza vivdaŭro longiĝas. En Ĉinio cirkulis la diro: "Malmultaj ĝisvivas la 70-jaran aĝon de la antikveco." Nun la diro ne povas esti plu kredata.

La maljunuloj, kiuj longe laboradis, ne volas esti nenifaraj post emeritiĝo. Iuj lernas pentradon, aliaj kulinaran arton, triaj fotografion... Ili havas malsamajn hobiajn, tamen ili ĉiuj donas grandan atenton al korpo-ekzercado. Precipe en urboj matena korpo-ekzercado preskaŭ fariĝis "deviga lernobjekto" por ili. Iuj diris: "Mateniĝon anoncas kokoj en la kamparo, kaj nian urbon vekas el la dormo korpo-ekzercantaj maljunuloj." Ni prenu Pekinon kiel ekzemplon. Ĉiutage, en matenkrepusko maljunuloj jam kolektiĝas en parkoj grandaj kaj malgrandaj. Ili sin ekzercas per tajĝiĉjŭan, ĉigong-o aŭ danco. Ili montriĝas tiel viglaj kaj gajaj kiel junuloj.

En la socio ĉiam pli grandiĝas la nombro de maljunuloj. Malgraŭ sia maljuneco ili persiste partoprenas en korpo-ekzercado. Tio sendube estas laŭdinda.






1. En kurso de ĉin-stilaj pentraĵoj
2. Piedvolana ludo

Foto de **KANG TAISEN**

3. Korpo-ekzercado en mateno
4. Aŭskultado de radioelsendo
5. En alternejo por gemaljunuloj

	3
1	4
2	5



# Landa

## Esperanto-biblioteko

### fondita en Ĉinio

La ĉina Esperanto-movado ekzistis preskaŭ cent jarojn. En Ĉinio aperis pli ol mil Esperantaj libroj kaj gazetoj, kaj akumuliĝis abundaj informmaterialoj en kaj pri Esperanto. Celante pli bone kolekti, ordigi, ekspluati kaj utiligi la Esperantajn informfontojn, por ke ili bone servu al E-movado, Esperantaj laboroj kaj kulturado de kompetentaj esperantistoj, la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) fondis la Ĉinan Esperanto-Bibliotekon (ĈEB). Ĝi servas ne nur al la Esperantaj instancoj, sed ankaŭ al la tutlandaj esperantistoj kaj Esperantaj organizoj. La librojn povas prunti ne nur pekinaj esperantistoj, sed ankaŭ legantoj en aliaj lokoj pere de la poŝto. La biblioteko starigos en sia komputilo informsystemon kaj ofertas konsultservon al en- kaj eksterlandaj esperantistoj. Ĝi ankaŭ kunlaboros kun eksterlandaj E-bibliotekoj kaj E-muzeoj kaj partoprenos en internacia interŝanĝo de E-informoj.

ĈEL jam komisiis veteranan esperantiston Liu Ling respondi pri la biblioteko kaj cedis unu ĉambron kiel sidejon de la biblioteko, la redakcio de "El Popola Ĉinio" permesis al ĝi uzi la fonduson donacitan de belga esperantisto Charles Ghiselin por aĉeti librobrotojn. ĈEL kaj EPC metis sian tutan librokolekton sub la disponon de la biblioteko. Katalogo, statuto kaj aliaj reguloj estas ellaborataj. Kiam ĉio pretiĝos, la biblioteko estos oficiale malfermi-

ta kaj komencos servi al la legantoj.

Fondi ĉinan Esperanto-bibliotekon jam delonge estas forta deziro de la ĉina esperantistaro, kaj des pli fokuso de la atendo kaj zorgo de veteranaj esperantistoj. Ĵelezo, elstara iama gvidanto de la ĉina E-movado, antaŭ sia forpaso donacis al ĈEL sian Esperantan librokolekton kaj plurfoje proponis fondi E-bibliotekon, por ke la libroj estu bone uzataj. Por tion efektiviĝi ofte urĝis Chen Yuan, honora prezidanto de ĈEL. Ankaŭ Honfan, veterana esperantisto kaj ĉefredaktoro de ESPERANTO-ĈINA VORTARO, donacis sian Esperantan librokolekton. Kaj Tikos, alia veterana esperantisto, kiu dediĉis sian energion al Esperanto dum sia tuta vivo, iam responsis pri la biblioteko de EPC, multe kontribuis por ordigi la librojn kaj fervore kuraĝigis kaj helpis junajn gesamideanojn en legado. Ili ja metis fundamenton por la ĉina E-biblioteko materie kaj spirite.

Pri tio multe zorgas ankaŭ eksterlandaj amikoj. Precipe 87-jara s-ro Bruno Vogelmann, honora membro de UEA kaj la aŭtoro de LA NOVA REALISMO, ĉiam multe zorgas pri la ĉina E-movado. En junio 1995 li sendis ĉ. 20 leterojn al ĉefaj Esperantaj instancoj kaj organizoj kaj ankaŭ al iuj famaj esperantistoj en Ĉinio. En la letero li konfirmis la grandan kontribuon de la ĉina E-movado kaj ĝian gravan rolon

en la internacia E-movado kaj alvokis, ke urĝe necesas centra ĉina E-biblioteko kaj centra ĉina E-muzeo. Por ilin fondi li donis bonajn konsilojn. Kvankam ĉinaj esperantistoj jam delonge havas tian deziron kaj planon, tamen ili ankoraŭ ne ekagis. Lia alvoko ja akcelis la decidon kaj la agon. Informiĝinte, ke ĈEL jam decidis fondi ĉinan E-bibliotekon, li tuj rekomendis al la responsulo de ĈEB alilandan E-bibliotekon kaj iujn spertajn esperantistojn, kiuj iam funkciigis E-bibliotekon, por ke ĈEB petu de ili helpojn kaj konsilojn. Li la unua donacis monon kaj librojn por subteni la fondon de ĈEB per sia aktiva agado.

ĈEB estas popola kultura serva instanco, sen subvencio de la registaro. Ĝi fondiĝis, sin apogante sur la subteno de esperantistoj, kaj ilin servas. Alivorte ĝi estas sin-serva organizo de esperantistoj. ĈEL esperas, ke en- kaj eksterlandaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto subtenos la novan Ĉinan Esperanto-Bibliotekon, donacos monon kaj librojn kaj donos konsilojn kaj helpojn. Dank' al la subteno kaj prizorgo de la esperantistaro, ĈEB certe prosperos pli kaj pli.

Adreso de ĈEB: S-ro Liu Ling, p/a Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, CN-100037 Pekino, Ĉinio Tel. (010)68326682

**Rimarko:** Librobonaĵoj bonvole sendu unue liston de la donacotaj libroj, kaj sendu la librojn nur post ricevo de la respondo de ĈEB.

# Antikva urbeto

## Shendu

Teksto kaj fotoj de FANG KANGNING

**N**ENIAM mankas akvo al urbetoj sude de Yangzi-rivero. Ĝuste dank' al Xin'anjiang (Ŝin'angĵang)-rivero, Shendu farigis urbeto kun pli ol 17 000 loĝantoj el malgranda kajo de antaŭ 1 000 jaroj.

En pluva sezono la larĝa Xin'anjiang kun siaj branĉoj ĉirkaŭas la urbeton en tri flankoj. Sur la rivero navigas kargoŝipoj, precipe multaj bambu-markezaj boatoj. Granda bambu-markeza boato povas akcepti ĉ. 30 homojn kaj malgranda nur kelkajn. Ofte vidiĝas la sceno, ke oni sidante en boato manĝas kuiritajn sojfabojn kaj babilas kun la boatisto, dume la boato antaŭeniras, tranĉante la ondojn.

Preparado de ĉina medikamento



Veturante de Shendu per ŝipo laŭ la fluo de Xin'anjiang, oni povas veni al la fama urbo Hangzhou, Zhejiang-provinco, kaj kontraŭflue al la pitoreskejo Huangshan de Anhui-provinco. Evidente, Shendu estas nepra loko, kiun oni trapasas inter Huangshan kaj Hangzhou. Antaŭe en la meza parto de Xin'anjiang ne konstruiĝis akvokonservejo, kiu nun garantias la tutjaran navigeblecon sur la rivero. En la historio, en ĉiu seka sezono estis neeble navigi en la supra parto de la rivero. Kaj ligno, teo kaj aliaj produktoj de Anhui devis resti en Shendu por atendi transportadon. Tiel aperis la prospero de la kajo de Shendu, kie amasiĝis komercistoj el diversaj lokoj. Nun ĉiutage tien pasas ĉ. 10 000 homoj, inter kiuj estas turistoj kaj komercistoj.

En la antikveco la urbo Huangshan, al kiu Shendu nun apartenas, estis nomata Huizhou (Hujĝoŭ). Tie abundas montoj kaj mankas agroj. Multaj homoj devigite forlasis la kampojn por sin vivteni per komercado. La komercistoj de Huizhou estis plej viglaj dum la pasintaj 200-300 jaroj en la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero. Tiam ĉirklulis la diro: "Sude de Yangzi-rivero Huizhou estas la plej forta en komercado." Nun ambaŭflanke de la malnova strato de Shendu estas butikoj unu tuj

apud alia, kies defalintaj murpecetoj kaj malnovaj pordoklapoj videbligas postsignon de la iama prospero. Malantaŭ ĉiu butiko ĝenerale estas ĝia metiejo de vendotaĵoj.

Troviĝas originala apoteko. Laŭdire ĝi havas historion de pli ol 200 jaroj. La tabulo sur la linto kun vortoj "Sekvu malnovan manieron" ŝajne montras ĝian antikvecon. La apoteko havas tri kortojn ĉiu kun duetaĝa domo. La pli-ol-40-jara mastro primajstras farmakopeon kaj scipovas kuracadon. Ofte oni venis al la apoteko ne nur por aĉeti medikamenton, sed ankaŭ por peti pul-sopalpadon kaj kuracadon de la mastro. Kiel vendejo de ĉina medikamento, la apoteko abundas je grandaj altaj ŝrankoj kun tirkestoj. Ĝenerale unu tirkesto estas dividita en du aŭ tri partojn por enteni du- aŭ trispecajn drogherbojn kun ties nomoj skribitaj sur ĝi. Mirinde estas, ke apotekisto lerte tirmalfermas la bezonatan tirkeston tuj ĉe ekvido al la recepto. En la tirkestoj estas ofte uzataj drogherboj. La valoraj estas konservataj en boteloj el blublanka porcelano aŭ ujoj el kupro aŭ stano. Por speciala medikamento oni pretigis kupran dekoka-poton kaj porcelanan cinabran pistujon, kiuj estas tre raraj.




Malgraŭ la pasaĝeroj kaj komercistoj, la loĝantoj de Shendu vivas sian kvietan vivon en movpleno. Nur en aŭtuno, fininte la rikolton, ili per diverskoloraj silkaĵoj faras ponton, je kelkcent mil metroj longan, etendiĝantan de la komenco ĝis la fino de la strato. Oni nomas tion "Konstruo de ĉiela ponto". Tiam ĉiuj familioj bruligas incenson kaj benopetas de dio. Najbaraj kamparanoj venas por vendi indigenajn produktojn, aĉeti necesajojn aŭ viziti parencojn kaj amikojn. La urbeto plenas de ĝojo kaj muziko. ■



1. Parto de Shendu
2. La urbeto en printempo
3. En festotago
4. Al la urbeto
5. Infanoj en korto

1	3
2	4
	5







Li Huamei (maldekstre), Phanthog (meze) kaj Li Leshi en Pekino

## VIRINOJ KAJ INFANOJ

# Tri virinoj en polusoj

de CAO LEJIA

**E**N Antarkto, Arkto kaj Ĉomolangma, la plej alta montpinto de la mondo, nomataj 3 polusoj de la terglobo, neniam degelas glacio kaj neĝo,

kapricas veteroj, oftas danĝeroj kaj vivas apartaj etnoj. De la lastaj jarcentoj, homoj foje-refoje iris tien por esplori la naturan misteron, plene montrante siajn saĝon kaj kapablojn. Inter ili estis

tri eminentaj ĉinaj virinoj.

## HOMO PLI ALTA OL MONTO

En la frua somero de 1975 tibetano Phanthog kaj aliaj mem-



broj de la Ĉina Montgrimpa Ekspedicio ascendis Ĉomolangma laŭ ĝia nordorienta deklivo en Ĉinio. Post 3-monata trejnado por revigligi la fizikajn kapablojn, 37-jara Phanthog, patrino de 3 infanoj, kaj 8 aliaj sturmantoj komencis la grimpadon. En la 26-a de majo post kiam ili starigis la lastan sturman kampadejon en la loko je 8 680 m alta super la marnivelo, aŭdiĝis en radiotelefono voĉo el la komandejo: "Phanthog, nun vi plenumas la aferon senprecedencan en la ĉina montgrimpa historio, reprezentante 400 milionojn da ĉinaj virinoj!"

"Mi komprenas. Se nur mi havos unu spiron, mi certe atingos la montpinton!"

Je la 8-a de la 27-a de majo Phanthog kaj 8 aliaj homoj sukcese transiris en 3 grupoj la "Duan Ŝtupon" je 8 700 m alta. Post 6-hora vivmorta batalo ili finfine konkeris la montpinton Ĉomolangma je la 14-a kaj duono, kaj Phanthog fariĝis virino "la plej alta" en la mondo.

Phanthog naskiĝis en mizera tibet-nacia familio en Tibeto. De sia infaneco ŝi paŝtis brutojn en Himalajo. La malfacila vivo hardis ŝin. En 1959 ŝi aliĝis al la Ĉina Virina Montgrimpa Ekspedicio. Ekde tiam ŝi deziregis foje stari sur la montpinto Ĉomolangma 8 848.13 m alta super la marnivelo.

20 jarojn poste, kiam Phanthog rememoris la scenon sur Ĉomolangma, larmoj inundis ŝiajn okulojn. Ŝi kun emocio diris: "Montgrimpado estas grandioza faro, por kio multaj alpistoj oferis sian junan vivon. Unu el miaj plej intimaj koleginoj kuŝas eterne sur glacia monto pro lavango kaj mi perdis 5 piedfingrojn de frostovundo. Malgraŭ ĉio ĉi tio, en la lastaj 20 jaroj 10 virinoj konkeris tiun poluson de la terglobo. Ili atestis per sia agado, ke homo estas ĉiam pli alta ol monto."

## SEN POLUSO EN SCIENCA KAMPO

Antarkto estas kontinento plej malfrue kaj malmulte konata de la homaro. Pro ekstrema frosto, senbrida neĝostormo kaj terure longa senluma vintro ĝi restis mistera por la homoj. Nur antaŭ 200 jaroj, iuj marvojaĝistoj kaj aventuristoj ĝin ekvizitis. De tiam sciencistoj faras esploron pri tiu neĝa mondo kaj iom post iom malkovris ĝian misteron.

La 4-an de decembro 1983 geologino Li Huamei, komisiite de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj Komitato de Antarkto, atingis Antarkton kun 2 misioj: kiel virino, ŝi devis persone sperti ĉu eblas por virinoj vivi kaj labori en Antarkto; kiel sciencistino, ŝi devis kolekti specimenojn de rokoj por esplori strukturon de la terglobo.

Antarkto estas kovrita de glacio kaj neĝo je 95% de sia surfaco. Sen vojo ŝi iris sur profunda neĝo, kun la pakaĵo el akvo, manĝaĵoj kaj ŝia borilo, peza je kelkdekoj da kg, sur sia dorso. En la regiono inter 77°-88°S, ŝi sole faris esploron kaj serĉis rokpecojn. Akompanate de antarktaj rokoj, ŝi pasigis tie la 48-an datrevenon de sia naskiĝo.

En Antarkto estas lago Vanda. Tiuj, kiuj naĝis tie, povas surskribi sian nomon en memorkajero kaj akiri medalon. Tio montras ke ili estas bravaj homoj. Leginte en la kajero neniun nomon de ĉino, Li Huamei plonĝis en la glacian akvon. Ŝi fiere diris: "Kompreneble, mi akiris la medalon."

Post la vojaĝo en Antarkto ŝi publikigis fakan verkon, la unuan en Ĉinio pri geokemio de Antarkto, dank' al kiu ŝi akiris la Natursciencan Premion de la Ŝtato kaj 6 aliajn sciencajn premiojn. Ŝi diris, ke esploro pri Antarkto estas nur ŝia startpunkto, ĉar en scienca kampo ne estas poluso.

## DEFIE AL LA TRI POLUSOJ

La hongkong-a virino Li Leshi emas sin vesti kiel vojaĝistino. La

8-an de aprilo 1993 ŝi la unua levis la nacian flagon de la Ĉina Popola Respubliko en la norda poluso. Dum 25 jaroj ŝi vojaĝis tra la tuta mondo. Ŝi atingis 4-foje Arkton kaj Antarkton, 2-foje surgrimpis Ĉomolangma kaj vojaĝis tra la Dezerto Taklimakan...

Dirite, farite. Tio estas ŝia persona dogmo. En la aĝo de 19 jaroj ŝi decidis vojaĝi tra la mondo. Por tio ŝi ekzercis sin per sportoj, kiaj naĝado kaj montgrimpado. Ŝi piedire ekskursis sur ĉiuj stratoj kaj en antaŭurbo de Hongkong, vojaĝis en la ĉina provinco Taiwan, sudorientaziaj landoj, Aŭstralio... En 15 jaroj ŝi postlasis siajn spurojn en pli ol 100 landoj kaj regionoj. Kiam ŝi venis Antarkton en 1985, kiel membro de la ĉina ekspedicio, ŝin tuj forte allogis la tieaj glaciaj riveroj, polusa lumo, granda vivipoveco de la estaĵoj en la malfavoregaj medioj sur la neĝkovrita kontinento. Ekde tiam ŝi fariĝis nedisigebla de la 3 polusoj.

Por vekti la homan konscion ami kaj protekti la naturon ŝi multe fotis por montri la naturon kaj scenojn, kie diverslandaj sciencistoj esploris la naturon. Lastatempe ŝi klopodas por starigi la polusan muzeon de Ĉinio. Ni esperas, ke ŝia deziro realiĝos kiel eble plej baldaŭ. ■



# *Gaja danco de kamparanoj*


Fotoj de **AI LIKEN**

Kutime ĉe la komenciĝo kaj finiĝo de priklado, sarkado, aŭtuna rikoltado, vojkonstruado kaj pontokonstruado kamparanoj dancas gajan dancon, trinkinte dolĉan rizvinon.

En la Yanbian-a Kore-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Jilin, nordorienta Ĉinio, troviĝas la vilaĝo Changxingxintun, kiu meritas la nomon "vilaĝo de gaja danco". La vilaĝanoj ne nur heredis la tradician trajton de la danco, sed ankaŭ ensorbis kremon de aliaj popolaj dancoj, kiaj "maskodanco", "tambura danco" kaj "ruband-ĉapela danco", tiel ke la danco fariĝis pli gaja kaj gracia, esprimante la enhavriĉan vivon de la kore-nacianoj.

En la vilaĝo loĝas pli ol 70 kamparanaj familioj. Ili neniam forgesis heredigi la morojn kaj kutimojn de kore-nacianoj de generacio al generacio. Por la aktivado ili donacis monon por aĉeti aliloke muzikajn instrumentojn, kostumojn, ĉapelojn kaj rubandojn por la dancantoj. Por festoj ĉiuj familioj preparas rizvinon kaj moĉion. Ĉiuj vilaĝanoj, ĉu viroj ĉu virinoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, kolektiĝas por gaje danci kaj kanti, esprimante sian amon al la bela vivo.





1. Tambura danco
2. Gaja danco
3. Masko-danco
4. Ruband-çapela danco

1	3
2	4

### SALUBRA ĈINA GASTRONOMIO

Ĉinan gastronomion karakterizas koloro, aromo, gusto kaj salubreco.

Ĉinan gastronomion antaŭenpuŝas san-protektaj konceptoj de ĉinoj. Surbaze de tio, furoras proks. cento da metodoj por prepari ĉinajn pladojn, inter kiuj ne mankas salubraj. Ni turnu nin al rostita pekina anaso. Kutime, por garantii ĝian kvaliton oni alprenas du manierojn. Unu el ili estas ŝmiri anason per maltozo por faciligi koloriĝon de la preparaĵo kaj malebligi estiĝon de nesalubraj substancoj en la anashaŭto dum rostado, kaj la alia estas enverŝi akvon en la kapon de la anaso por malaltigi la temperaturon kaj plene rosti ĝiajn haŭton kaj karnon. Krome, al ĉinaj pladoj oni aldonas ankaŭ amellikvaĵon dum preparado, ke ĉiuj nutraj elementoj en ili ne detruigu sub alta temperaturo kaj la pladoj estu kiel eble plej bongustaj.

Ĉina gastronomio baziĝas sur dietistiko, kiu varias laŭ sezonoj kaj klimato. Ĝi kombinas san-protektan kun dieta terapio, t.e., preparante ĉinajn pladojn el naturaj materialoj, oni devas atenti sanigan efikon. Ĉio, kio estas utila al la sano, taŭgas por ĉinaj pladoj.

### PEKINA OPERO EN LA OKULOJ DE ALILANDANOJ

Pasintjare okazis en Tianjin (Tjanĝin) la Unua Festivalo de Pekina Opero, kiu altiris multe da alilandaj amantoj. Tio montras la translandliman kaj transepokan ĉarmon de pekina opero kaj la veron de arto: ju pli nacia, des pli internacia.

Spektante prezentadon de la Ĉina Teatro de Pekina Opero en Japanio en la 80-aj jaroj, iu japana junulo ekinteresiĝis pri pekina opero. Ĉi-foje li venis al Tianjin speciale por ĝui prezen-



Maja, brita studentino en Ĉinio, rolas en pekina opero.

tadon de pekina opero. Li diris, ke tiu opero estas plej esprimriĉa. Lilia Semenovna, ruslingva instruistino de la Fremdlingva Instituto de Tianjin, diris: "Kvankam ni ne bone komprenas la vortojn, tamen la prezentado sentigas al ni la belecon de la tradicia ĉina arto. Ni havas la senton, kvazaŭ ni spektas klasikan operon de nia propra nacio en la Teatro de Moskvo. Alia alilanda instruistino Volia, kiu laboras en Nankai-universitato, asertis, ke la fiktiva prezentado de pekina opero ebligas al spektantoj transiri lingvajn barojn kaj kompreni, ke vipado aludas ĉevalrajdon kaj flavo simbolas impestrecon.

Iu itala studentino opiniis, ke pekina opero entenas la koncepton de la orientanoj pri valoro kaj la historion de Ĉinio. Pekina opero ebligas koni la historion kaj kulturon de Ĉinio.

### MEDI-PROTEKTAJ VERDEJOJ EN LA SUPRA BASENO DE YANGZI-RIVERO

Post 5-jara transformado de ekomedio en la alt-altituda regiono de Qinghai-provinco, okcidenta Ĉinio, oni sukcese konstruis 20 000 medi-protektajn verdejojn en la regiono, 4 000 m super la marnivelo, de la supra baseno de Yangzi-rivero.

Yangzi-rivero fontas el la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Ĝia baseno en la provinco havas areon de 156 000 kvadrataj kilometroj. Pro alta altitudo kaj malalta temperaturo tie maldensas flaŭro kaj seriozas perdo de akvo kaj grundo. En 1990 oni komencis konstruadon de la sistemo de kamposirmaj forstoj en tri gubernioj de la supra kaj meza basenoj de Yangzi-rivero.

La 20 000 medi-protektaj verdejoj dissemiĝas en la tibetnaciaj gubernioj de la provinco, nome, Yushu kaj Chindu de la Yushu-a Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco kaj Bama de la Golog-a Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco. En la pasintaj kvin jaroj oni kulturis 2 800 hektarojn da forstoj, arbarizis 87 000 hektarojn en montoj, plantis pli ol milionon da arbedo en kortoj kaj faris pli ol 70 montarajn arbarojn. Tiuj forstoj ŝirmis la kampojn kontraŭ sablo-ventego kaj multe plibonigis la tiean ekomedion.

La sukceso pretigis kondiĉojn por grandskala transformado de alt-altituda ekomedio. Laŭplane, oni faros ĉiufankan transformadon de dezertaj montoj ĉeriveraj en la provinco.

# Profundaj sentoj al la Silka Vojo

Teksto de BING CHUAN

Fotoj de HAN HONG

**P**ARTOPRENANTOJ de la 71-a UK en Pekino en 1986 eble ankoraŭ memoras la danc-dramon "Silka Vojo" ludatan de ĉinaj artistoj. La flirtaj danc-movoj, pimpaj kostumoj, ekzotikaj muzikoj kaj grandiozaj scenoj bone impresis ĉiujn spektantojn.

De tiam forpasis 10 jaroj. Kiam mi renkontis artistojn de la danc-dramo en Lanzhou, mi estis refoje kortuŝita ne nur de ilia arto, sed ankaŭ de ilia profunda amo al la Silka Vojo.

## LA DRAMO SURSCENIGANTA LA ANTIKVAN VOJON


Leviĝis la kurteno. Aperis sur la scenejo movoplena strato de Dunhuang. Sur la strato iris ĉinoj kaj okcident-aziaj komercistoj. La dramo kondukis la spektantojn el modernaj urboj al la senlima Gobio kaj antikva Silka Vojo, sur kiu sonadis kamelaj tintiloj, al la Granda Muro kaj ŝtonkavernaroj de Dunhuang. Jen okazintaĵo en la prospera Tang-dinastio. La travivaĵo de maljuna pentristo Zhang kaj lia filino Yingniang kaj la intima amikeco inter ili kaj persa komercisto konigas la amikecon

inter la popoloj ĉina kaj okcident-azia. Ili konigas ankaŭ, ke la Silka Vojo ne nur taŭgis por komercado, sed ankaŭ funkciis kiel kultura ponto, ĉar dank' al ĝi, Ĉinio sorbis sukcojn de la okcidentaj artoj, kiaj muziko, danco kaj pikturo. Parolante pri la kultura trezoro de Ĉinio, oni ne povas ne menci la historian rolon de la Silka Vojo kaj la influon de la artoj de okcident-aziaj landoj.

Iasence oni povas diri, ke la danc-dramo "Silka Vojo" revivigis la artajn figurojn sur freskoj

de Mogao-ŝtonkavernaro en Dunhuang kaj la antikvan muzikon de Tang-dinastio, kristaliĝon de la kultura interŝanĝo inter la Oriento kaj Okcidento kaj samtempe dotis ilin per orientaj trajtoj. Ni prenu la pimpajn kostumojn kiel ekzemplon. Iu eksterlandano diris: "La kostumoj de centoj da dancistoj vidigas ĉiujn plej belajn kolorojn de la mondo." El tiuj belaj kostumoj oni konas la koncepton de Tang-dinastio pri beleco de la homa korpo. La tiamaj homoj ŝatis diversajn dekoltaĵojn kaj en la

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







Maljuna pentristo Zhang kaj lia filino Yingniang




Ludo de bivo post la dorso





Persa karavano danças antaŭ ol en-  
iri en Tang-imperion.



Yingniang



Ĉinoj kaj alilandanoj en foiro en Dunhuang

danc-dramo oni povas vidi, kiaj estis la bodisatvaj kostumoj en Hindio siatempe. La danc-movoj estis multe influitaj de tiuj en freskoj de la ŝtonkavernaro, kiaj danc-movoj de hindoj kaj nacimalplimultanoj en okcidenta Ĉinio. Estas ja okulfrapa la danc-movo pluki bivon post la dorso. Heroino Yingniang staris sur piedpinto kaj ĉe pirueto ŝi levis la manojn post la dorson kaj ekplukis bivon. Tiu pozo klare videblas en la fresko de la ŝtonkavernaro.

## KOMPONAĴO DEĈIFRITA EN LA TUTA VIVO

S-ino Xu Qi (Ŝju Ĉji), vices-trino de la Dunhuang-a Arta Teatro de Gansu-provinco, diris, ke por verki la danc-dramon la koreografoj vojaĝis laŭ la antikva Silka Vojo kaj konsultis amason da materialoj. Ili vivis en Dunhuang pli ol unu monaton, pririgardis pli ol 400 kavernojn kaj kopiis multe da freskoj.

Post la sukceso en la danc-dramo "Silka Vojo" la teatro prezentis ankaŭ "Rakonto pri Harpo", "Muziko kaj Danco de Dunhuang", "Antikva Muziko de Dunhuang" kaj aliajn dramojn. Ili ĉiuj temas pri la Silka Vojo. Interalie, la dramo "Antikva Muziko de Dunhuang" estas opero kreita surbaze de "Komponaĵo de Dunhuang". Por deĉifri "Komponaĵo de Dunhuang" ĉinaj artistoj de pluraj generacioj dediĉis sian energion.

"Komponaĵo de Dunhuang" estis manuskripto de la akompanaĵo por bivo-ludado de laika ĉina kantodanco en la 9-a jc. Ĝi, verkita en la muzika lingvo plej frue uzata en la mondo ĝis nun trovita, konsistas el 25 pecoj.

Dum jardekoj la ĉinaj kaj alilandaj fakuloj penadis deĉifri la komponaĵon. Nur en 1982 ĝin sukcesis deĉifri profesoro Ye

Dong de la Ŝanhaja Konservatorio, sed pro neĝusta deĉifrado de iuj signoj la muziko fariĝis malfacile komprenebla, melodio stranga kaj takto anormala. Kaj kiam oni atendis lian perfektigon de la deĉifrado, li mortis. Sekve de tio, la peza tasko denove deĉifri la komponaĵon falis sur aliajn artistojn.

En la efektiveco, antaŭ prof. Ye oni jam studis pri la komponaĵo kaj publikigis disertaĵon kaj post li iuj esplorintoj ŝanĝis iujn notojn kaj faris ĝin orelplaĉa, kaj eĉ kun trajtoj de nacimalplimulta muziko, tamen por

tiam li dediĉis sian tutan energion al ĝia esploro. Finfine li sukcesis fari novan deĉifradon al la komponaĵo, ke ĝi fariĝis fidinda kaj belsona. Kaj pli grave estis, ke li fundamente solvis la problemon pri taktoj komunaj al muziko kaj danco el la vidpunkto pri kunigo de poezio, muziko kaj danco. En 1994, kiam solene surscenigis "Antikva Muziko de Dunhuang", grave malsana s-ro Xi Zhenguan venis al la teatro en rulseĝo. La muziko kortuŝis lin ĝis larmoj. Post unu monato s-ro Xi adiaŭis la homan mondon kun profunda



Duopa kantado de Shaanxi-opero

tiu ŝanĝo malfacile troveblas historia bazo. Nun, kiam oni havas tute fidindan deĉifritan komponaĵon kaj surscenigis ĝin, oni kun granda malĝojo funebri alian artiston s-ro Xi Zhenguan (Ŝji Ĝengŭan).

En 1982 s-ro Xi Zhenguan veturis al Francio. En la Pariza Biblioteko li vidis "Komponaĵo de Dunhuang" kaj aliajn historiajn materialojn. Kvankam oni diris al li, ke estas senditaj la fotokopiaĵoj de tiu komponaĵo al Ĉinio, li transskribis la komponaĵon kun granda ĝojo. De

amo al la Silka Vojo.

## SKULPTISTINO SUR LA SILKA VOJO

Se la Lanzhou-aj dancistoj montras la morojn sur la Silka Vojo per danc-movoj, do skulptistino He E manifestis la longahistorian ĉinan civilizacion per skulpturo.

Koncerne s-inon He E, mi ne povas ne mencii ŝian skulptaĵon "Patrino la Flava Rivero" el blanka granito, kiu staras ĉe la Flava Rivero en Lanzhou. Kiam mi vizitis ŝin, mi kvazaŭ



reknabiĝis kaj reiris en la sinon de la patrino. Ŝi, forta kaj sana, havas harojn longajn ĝis la ŝultroj kaj amplenajn kaj saĝajn okulojn sur la tenera vizaĝo. En ŝia sino petolas naiva infano... Ĝuste ŝi, amata kaj estimata patrino, entenas la ĉinan teritorion en sia sino, per sia dolĉa lakto nutras la diligentan kaj bonkoran ĉinan popolon kaj per sia saĝo kreis la brilan ĉinan kulturon. Ŝi estas simbolo de la Flava Rivero, lulilo de la ĉina nacio. Ŝi ja estas la patrino de Ĉinio.

Kun estimo al "Patrino la Flava Rivero" kaj respekto al la skulptistino mi iris al s-ino He E. Kiam ŝi, maldika kaj malalta, aperis antaŭ miaj okuloj, mi simple ne povis asocii ŝin kun la impona skulptaĵo. Ĝuste en la momento, kiam mi manpremis ŝin, mi kredis, ke ĉio ĉi tio estas vera, ĉar ŝiaj manoj estis krudaj kaj fortaj pro longtempa prilaborado de ŝtonoj.


La malkaŝema s-ino He E diris al mi, ke ŝi devas atribui sian sukceson al Dunhuang, kie ŝi loĝis 12 jarojn. En tiuj jaroj ŝi faris multe da kopioj de freskoj, dank' al kio ŝi metis firman bazon por sia laboro en la estonteco. Por projekti la statuon "Patrino la Flava Rivero" ŝi laboris en budo tri monatojn en somero. Jen el ŝia kapo naskiĝis la ideo de la projekto: La patrino simbolas la Flavan Riveron kaj la infano — Ĉinion. En verkado ŝi intence troigis la fortojn de la Flava Rivero kaj faris la vestojn de la patrino ondantaj, kio simbolas la torentantan riveron.

Ŝi diris al mi, ke nun ŝi faras ĉion eblan por realigi sian plej

grandan deziron — establi skulpturan instituton kaj fari pli da skulptaĵoj el diversaj ŝtonoj.

## OPERO TRE ŜATATA DE LA POPOLO

Kiam mi estis en Xi'an, ĉe la piedo de la antikva urbomuro mi spektis Shaanxi(Ŝenŝji)-operon. Ĝi estas populara en la provincoj Shaanxi, Gansu kaj aliaj lokoj de nordokcidenta Ĉinio. Survoje al Lanzhou mi



Provludo

spektis plurfoje tiun operon. Ĝi estas la tiea popola arto nutrata de la Flava Rivero, kvankam ne delikata nek oreplaĉa, kiel la muziko de la danc-dramo "Silka Vojo" kaj "Antikva Muziko de Dunhuang".

Shaanxi-opero havas ian rilaton kun la loko, kie ĝi naskiĝis. Imagu al vi, kia spektaklo estas, kiam sur la malmulte loĝatan Leŭsan Altebenaĵon venas teatra trupo. La opero estas alloga, akompanate de laŭta muziko.

Fakte, la historio de Shaanxi-

opero estas tre longa kaj ĝia teksto zorgeme polurita. Ĝi naskiĝis en la 14-a jc. Ĉinaj dramaturgoj diris, ke eĉ Pekin-opero, trezoro de la ĉina arto, estis iam influita de Shaanxi-opero. Estas nun pli ol 2 600 tradiciaj dramoj de Shaanxi-opero, kiuj konigas la riĉan kulturon kaj la morojn de la loĝantoj sur la antikva Silka Vojo.

La popolo ŝatas Shaanxi-operon, ĉar ĝiaj vortoj estas facile kanteblaj. La plej fruaj dramoj de Shaanxi-opero naskiĝis surbaze de popolkantoj popularaj en Shaanxi kaj Gansu. Ĝuste pro tio, la vortoj apartenas al ĉeloka parola lingvo. La ordinara opero iam estas trista por esprimi malĝojan intrigon. Jen tekstas la disiĝo de geedzoj.

*Geedza disiĝo korŝiras,  
Monaton malĝojo min pikas.  
Griznokte sur dezerta tombejo,  
Mi por la edzino lamentas.*

Ŝajnas al mi, ke en la lastaj jaroj Shaanxi-opero ne estis tiel ŝatata de la urbanoj kiel antaŭe. Iuj diris, ke ĝi temas ĉefe pri antikveco, kaj krome, la tekstoj iagrade arkaikiĝis, aliaj diris, ke ĝi ne estas oreplaĉa, triaj diris, ke nun oni povas rigardi televidon kaj filmon, do por kio oni ŝatu Shaanxi-operon. Malgraŭ tio, la loĝantoj sur la Leŭsa Altebenaĵo ja neniam perdas sian amon al ĝi. Akompanate de la torenta Flava Rivero kaj vento sur la Silka Vojo, la melodio de Shaanxi-opero ja estas tre altira. Eble ĝuste en tio kuŝas la ĉarmo de arto. ■




Shaanxi-opero prezentata en vilaĝo




"Tri Edzinoj" el la sceno de Shaanxi-opero


Foto de XUE TIANXIANG



Ŝtona skulptaĵo "Patrino la Flava Rivero"



Argila budhostatuo farita de He E



S-ino He E en laboro

# Balotado de kamparanoj pri vilaĝestreco

**V**ILAĜO estas la plej elementa unuo en la ĉina kamparo. Vilaĝoj konsistigas subdistrikton kaj subdistriktoj — gubernion. Vilaĝo havas unu aŭ plurajn loĝ-grupojn

kun ĉ. mil loĝantoj. En Ĉinio estas pli ol miliono da vilaĝoj kun 80% da loĝantoj de la tuta lando.

Vilaĝo-sistemo ekzistis jam komence de la fondiĝo de la nova Ĉinio, kaj ĉiam la supera instanco instalas la vilaĝestron post kolek-

pri puno al tiuj, kiuj ne volas vivteni siajn gepatrojn. Ma Baojin, elektita denove kiel vilaĝestro, diris: "Kiel severaj la kamparanoj! Se vi preterlasas iun ajn en la balotado, li akuzos vin."

La nomita leĝo diras, ke la vilaĝa komitato konsistas el estro, vicedestro kaj 2-5 aliaj membroj, kaj la elektado okazas en ĉiu tria jaro. La komitato de Machangying-vilaĝo konsistas el kvin anoj — Ma Baojin respondecas pri ĉio grava kaj i.a. pri publika sekureco kaj milicio, la vicedestro pri konstruado kaj entreprenoj, la ceteraj tri komitatanoj respektive pri agrikulturo, elektroenergio kaj naskolimigo (la lasta estas virino).

El la sep kandidatoj naskiĝis tiu komitato, kiu per siaj moralaj agoj kaj talento akiris prestiĝon. Ma Baojin klarigis, ke kandidatoj devenas de tri flankoj: propono de la supera instanco; rekomendo de pli ol dek voĉdonintoj; kaj sinrekomendo kun konsento de almenaŭ dek voĉdonintoj. Oni skribis la nomojn de la kandidatoj sur ruĝa papero gluita sur muro. Surmuriĝis ankaŭ la nomoj de la 1 200 voĉdonintoj el la 1 800 loĝantoj de Machangying-vilaĝo. Oni aranĝis tri lokojn por plenigi la balotilon: la unua por kleruloj, kiuj persone plenigis la balotilon; la dua por analfabetoj, kiuj petis alian por plenigi la balotilon; la tria por tiuj, kiuj volis kaŝe plenigi la balotilon. La vilaĝanoj laborantaj aliloke komisiis la balotadon al siaj parencoj.

Laŭ statistiko farita de koncer-



Balotado



Ĉe balotujo en la vilaĝo

tado de opinioj de kamparanoj. En 1989 la ĉina registaro ekpraktikis "Leĝo pri organizo de vilaĝa komitato", kiu difinas, ke la vilaĝanoj mem elektu potenc-havan organizaĵon — vilaĝan komitaton. Tiel la aŭtonomeco de vilaĝanoj estas konfirmita per leĝo. Nun tia aŭtonomeco populariĝis en la ĉina kamparo. Eĉ la maljunaj, nur iom legoscias kamparanoj povas facile plenigi balotilon.

## ĈIUJ BALOTU

En la vilaĝo Machangying, P i n g g u - gubernio, nord-oriente de Pekino, la kamparanoj balotis pri vilaĝestreco, pri vojkonstruo kaj

na departemento de Pekino, ekde 1989 pli ol 95% da kamparanoj de Pekino partoprenis ĉiujn tri tiajn elektadojn.

## SERVI AL VILAĜANOJ

Krom la komitato, la vilaĝanoj elektas ankaŭ reprezentanton el ĉiu deka familio. Ĉiujare okazas almenaŭ du kunvenoj de reprezentantoj, je jarkomenco por diskuti pri evolua plano kaj buĝeto faritaj de la komitato, je jarfino pri plenumado de la plano kaj bilanco.

En 1994 laŭ propono de reprezentantoj, la vilaĝo investis 250 000 juanojn (unu usona dolaro egalas al 8.3 juanoj) por konstrui fabrikan de tritika faruno, dank' al kiu la vilaĝanoj ne plu bezonis ŝanĝi tritikon kontraŭ faruno de alivilaĝanoj. Laŭ propono de reprezentantoj la komitato ankaŭ instalas altpovan transformatoron, por ke la vilaĝanoj povu ĝui televidan programon en horoj de kulmino de elektrozado. Dank' al esplorado de la komitato kaj la reprezentantoj, ĉiuj projektoj estis sukcese plenumitaj. En la vilaĝo fondiĝis pli ol dek entreprenoj de vestoj, akcesoraj presaj instalaĵoj, de kultivado kaj bredado.

Ma Baojin diris, ke nun la enspezo de la vilaĝo en unu jaro estas pli multa ol tiu en la pasintaj 20 jaroj. Antaŭe la kamparanoj devis kultivi, kion kaj kiom decidis la supera instanco. Nuntempe la komitato decidas evoluon programon, subtenate de la vilaĝanoj, kaj mem respondecas pri profito aŭ defecito. En 1994 la pokapa enspezo de la vilaĝo estis pli ol 6 000 juanoj.

Nun ĉiujare la vilaĝo pagas 120 000 juanojn por asekuro de familia posedaĵo, vivo de la vilaĝanoj ktp. Ĝi pagas por la tuto de la akvokonsumo kaj duono de la elektrokonsumo de la vilaĝanoj kaj por iliaj eduko-fonduso kaj laŭkontrakta terkulturo. Ĝi ankaŭ subvencias pli-ol-60-jarajn

maljunulojn kaj pli-ol-55-jarajn maljunulinojn en ĉiu monato. La vilaĝanoj ne kotizas por konstruo de kanaloj kaj ŝoseoj.

## KAMPARANOJ MEM SOLVAS SIAJN PROBLEMOJN


La komitatoj de Machangying-vilaĝo estas taŭgaj administrantoj. Kiel estro laborinta tri jarojn, Ma Baojin diris: "Post ekpraktikado de aŭtonomeco, la vilaĝanoj multe malpli plendis pri nia laboro. Ni komitatoj ne bezonas perforte regi la vilaĝon, ĉar la vilaĝanoj ellaboris 'Regularo por aŭtonomeco de vilaĝanoj'."

La regularo kun ses ĉapitroj kaj 116 artikoloj donis solvojn pri tiaj problemoj, kiaj malobservo de la naskolimiga politiko, konflikto pri dom-pozicio, rifuzo de vivteno de maljunuloj, ŝtelo kaj interbatalo. En la supre menciita gubernio Pinggu, dank' al praktikado de la vilaĝa aŭtonomeco, malmultiĝis la kriminalaj kazoj jaro post jaro. Pasintjare en 75 vilaĝoj okazis neniu kriminala

kazo. La konfliktoj pri ter-peco kaj vivteno de maljunuloj reduktiĝis je 30% kaj 80% respektive. La Machangying-vilaĝanoj difinis ankaŭ, ke ĉiuj lernoagaj infanoj devas ricevi la naŭjaran devigan edukadon.

Iu pekina registara oficisto, respondeca pri kamparaj aferoj, diris: "La kamparanoj riĉiĝis post ekpraktikado de aŭtonomeco. Ili havas kapablon solvi siajn problemojn."

En Pekino estas 4 400 vilaĝestroj kiel Ma Baojin. En Ĉinio entute 1.06 milionoj da vilaĝoj okazigis elektadon kiel en Machangying, duono de tiuj vilaĝoj fondis sistemon de kunveno de reprezentantoj (la nombro de reprezentantoj jam superis 10 milionojn), triono de tiuj vilaĝoj ellaboris "Regularo por aŭtonomeco de vilaĝanoj". Tio montras, ke en socialisma merkata ekonomio, la ĉinaj kamparanoj pli multe atentis siajn proprajn interesojn, la administradon de la vilaĝoj kaj la konduton de vilaĝaj komitatoj. ■



"Nun furoras nudismo!"

Karikaturo de YE CHUNYANG



La aŭtoro (meze), fama filologo D. Blanke (dekstre) kaj fama verkisto C. Piron en internacia simpozio okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto en Tokio en 1986

## ĈINA KULTURO

# Fremdaj influoj en la ĉina lingvo

de ZHANG QICHENG

**L**Aŭ la aserto de fakuloj, la ĉina lingvo estas unu el la plej longhistoriaj kaj stabilaj lingvoj en la mondo. Ĝia historio longas je pli ol trimil jaroj, kaj ĝiaj fundamenta leksikono kaj gramatika strukturo nur iom ŝanĝiĝis ĝis nun. Dum sia longdaŭra evoluado, ĝi ensorbis multe da fremdaj influoj el aliaj popoloj.

La ensorbado povas esti dividita en du etapoj, t.e., antaŭ la Opia Milito (1840-1842)<sup>1</sup>, kaj post tiu milito, alivorte, la antikva Ĉinio kaj moderna Ĉinio.

En la unua etapo, la fremdaj influoj ankaŭ povas esti dividitaj en du kategorioj.

La unua kategorio konsistas el influoj de la t.n. "Okcidenta Regiono", kiu en la antikva Ĉinio situis en la okcidenta parto de Ĉinio kaj proksime de la nunaj mezaziaj kaj okcidentaziaj landoj. Jam en la frua Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 24 p.K.), la imperiestro Wudi (140 a.K. — 87 a.K. sur la trono) dufoje sendis senditon al la Okcidenta Regiono por interrilatiĝi kaj amikiĝi kun tieaj regnoj. Sekve de tio, komenciĝis la ekonomia kaj kultura interfluo inter Ĉinio kaj Okcidenta Regiono, kaj ekde tiam malfermiĝis la renoma Silka Vojo, kiu pli kaj pli oftigis la interfluojn. Ĉinaj produktaĵoj, ĉefe silkaĵoj, papero, porcelanaĵoj kaj belaj metiartaĵoj estis enkondukitaj en tiun regionon, dum di-

versspecaj bestoj, plantaĵoj, mineralaj objektoj kaj muzikiloj el tiu regiono en Ĉinion. Tiuj estaĵoj kaj objektoj estis tute nekonataj en la antikva Ĉinio kaj iliaj nomoj ne troviĝis en la ĉina lingvo. Do, estis necese krei novajn vortojn por ili. Jen estas kelkaj interesaj ekzemploj:

En Ĉinio ĉie troviĝas gravuritaj leonoj el ŝtono aŭ bronzo. En la antaŭurbo de Pekino eĉ troviĝas ŝtonponto kun 485 gravuritaj leonoj en diversaj pozoj. La vizitantoj al Ĉinio, rigardante tiun fenomenon, supozeble konjektus, ke leono estas besto jam de pratempo ekzistanta en Ĉinio kaj favorata de la popolo kiel simbolo de potenco kaj majesteco. Fakte, ĝi estis enkondukitaj el iu okcidenta regno kiel valora donaco al la imperiestro de Han-dinastio. Kaj la ĉina vorto *shi*<sup>2</sup> por leono estis kreita laŭ la antikva persa vorto "šēr".

La bongusta vinbero estis neniam gustumita de pratempaj ĉinoj. Nur kiam la imperiestro sendito Zhang Qian kunportis la semojn de vinbero hejmlanden el la regno Dayuan (parto de nuna Uzbekistano), vinberujoj estis grandskale plantitaj en la okcidenta kaj norda partoj de Ĉinio. En la ĉina lingvo vinbero estas nomata *putao*, ankaŭ tiu vorto estis pruntita el la antikva Persio, kie oni nomis vinberon "bādaga" aŭ "bātak".

En la ĉina lingvo troviĝas vortoj kun *hu* kiel kapvorto, kiu antikve

signifis "fremdlanda". Per tiu vorto oni nomis kelkajn plantaĵojn kaj muzikilojn el la okcidentaj regnoj, ekz., *hujiao* por pipro, *hugua* por kukumo, *hutao* por juglando, *hugin* por dukorda muzikilo ludata per arĉo, ktp.

La dua kategorio konsistas el influoj de budaismo.

Ekde Han-dinastio budaismo enkondukiĝis en Ĉinion kaj dum Tang-dinastio (618-907) la budaismaj sutroj estis grandkvante tradukitaj en la ĉinan lingvon el sanskrito. Do, budaismaj esprimoj kaj sanskritaj vortoj abunde aperis en la ĉina lingvo. Ekz., la ĉina vorto *fo* por budao estis ĉinigita el la sanskrita "buddha", poste ĝi estis simpligita kiel *fo* (verŝajne, en la klasika ĉina lingvo, la sono de *fo* estis analoga al "bu"). Ankaŭ la ĉinaj vortoj *seng* (monaĥo) kaj *yanwang* (dio de infero) devenis de sanskrito. Krom tiuj vortoj, kiuj estas evidente rilatantaj al budaismo, troviĝas ankaŭ vortoj, kiuj jam penetris en la ĉiutagan ĉinan lingvon, kaj oni ne plu konscias pri ilia budaisma deveno. Ekz., en la klasika ĉina lingvo oni simple havis la vorton *tianxia* (signife: sub la ĉielo) por esprimi la ideon de mondo, nur post la enkondukiĝo de la budaismaj sutroj, oni aplikis la pli taŭgan vorton *shijie* el budaisma verko. Kaj la ofte uzata vorto *chana*, kiu signifas momenton, estis ankaŭ budaismodevena kaj kreita laŭ la prononco de la sanskrita vorto "ksana". La budaisma

influo en la ĉina lingvo estas vere tre profunda, eĉ kelkaj ĉinaj idiomoj estis ĉerpitaj el la budaismaj sutroj. Pri tio mi traktis en mia artikolo "La idiomoj en la ĉina lingvo", kiu aperis en la 3-a n-ro, 1996 de EPC.

Krome, estas menciinde, ke sanskrito eĉ influis la fonetikon de la ĉina lingvo. Sanskrito estas alfabetata, dum la ĉina lingvo estas formita el unusilabaj ideogramoj. En pratempo la ĉinoj sciis nenion pri konsonanto kaj vokalo. La alfabetata sanskrito donis al ĉinoj la inspiron, ke fakte la ĉinaj ideogramoj ja enhavas similajn konsonantojn kaj vokalojn. Oni trovis, ke la ideogramoj prononcataj kiel *leng*, *ling*, *long* enhavas la saman konsonanton "l", kaj la ideogramoj prononcataj kiel *ban*, *dan*, *fan* enhavas la saman vokalon "an". Sekve, oni kreis la metodon de prononcado de ĉinaj ideogramoj per iu ideogramo kiel konsonanto kaj iu alia kiel vokalo, ekz., oni prenis la ideogramon *tu* kiel konsonanton "t" kaj la ideogramon *hong* kiel vokalon "ong" por prononci la ideogramon *tong*.

En la dua etapo, la influoj ĉefe devenis de la Okcidento (Eŭropo kaj Ameriko). Ĉar post la Opia Milito Ĉinio fariĝis duonkolonia lando kaj dronis en abismo de mizero kaj sufero, la tiama ĉina klerularo konsciis, ke, por ŝanĝi tian netolereblan situacion, oni devas renversi la putriĝintajn malnovajn sistemojn sociajn, ekonomiajn kaj politikajn kaj anstataŭigi ilin per la modernaj. Tiucele, oni devis havi novajn sciojn kaj novajn ideojn pri politiko, ekonomio kaj precipe pri scienco kaj tekniko. Sekve, je la fino de la lasta jarcento kaj komenco de la kuranta jarcento, multaj ĉinaj junuloj estis senditaj al Japanio kaj Eŭropo por studi, kaj granda kvanto da sciencaj verkoj kaj beletraĵoj eldonitaj en la Okcidento estis enĉinigitaj. Rezulte, la ĉina lingvo estis multe influata de la japana kaj okcidentaj lingvoj.

Pro tio, ke jam de post la periodo de Meiji-Reformado<sup>3</sup> (1868),

Japanio komencis progresi sur la vojo de modernigo, ĝi grandskale adoptis la sistemojn de la Okcidento. Politike, ĝi imitis Brition kaj aplikis konstitucian monarkion; ekonomie, ĝi energie kaj rapide disvolvis industrion laŭ la tipo de Eŭropo. Sekve, granda nombro da politikaj, ekonomiaj kaj sociaj vortoj kaj terminoj estis enkondukitaj en Japanion el okcidentaj landoj. Tiam, en la japana lingvo ankoraŭ sin trovis multaj ĉinaj ideogramoj<sup>4</sup>, kaj la japanoj ofte japanigis la okcidentlingvaj vortojn per ideogramoj. Do, kiam Ĉinio intencis enkonduki tiujn vortojn en sian lingvon, oni trovis, ke ili jam estis pretaj en la japana lingvo en la formo de ĉinaj ideogramoj kaj facile aplikeblaj por ĉinoj. Konsekvence, en tiu etapo, granda parto de la fremdaj vortoj aŭ esprimoj enkondukiĝis en Ĉinion ne rekte el la Okcidento, sed transportite el Japanio. Tiaj vortoj estas vere nekalkuleble multnombraj, ili jam fariĝis tre popularaj, kaj eĉ multaj ĉinoj ne plu scias, ke ili fakte estis enkondukitaj el la japana lingvo. Ekz., la ĉina vorto por "ekonomio" estas *jingji*, kiu estas tre ofte uzata en nuna Ĉinio pro praktika neceso. Kaj tiu vorto ja estis origine tradukita de japanoj el la okcidenta lingvo en la ĉinajn ideogramojn, kiujn ankoraŭ ĝis nun uzas la japanoj en malsama prononco.<sup>5</sup>

Kiam ĉinoj enkondukis la fremdlingvaj vortojn, ili ĝenerale praktikis tion per du metodoj laŭ la principo de oportuneco. Unu el ili estas ĉinigi ilin laŭ la senco de la koncerna vorto, ekz., oni ĉinigis la anglan vorton "horsepower" (ĉevalpovo) per la ideogramoj *ma* kaj *li* (*ma* estas ekvivalento de ĉevalo kaj *li* la ekvivalento de povo). La alia metodo estas ĉinigi ilin laŭ ilia prononco per ideogramoj kun similaj aŭ anaioĝaj sonoj, ekz., kafo estis ĉinigita kiel *kafei*, kaj histerio estis ĉinigita kiel *xiesidili* laŭ la angla vorto "hysteria". Ankaŭ estas vortoj ĉinigitaj duone laŭ la senco kaj duone laŭ la prononco, ekz., la angla vorto "icecream" (glaciaĵo) estis ĉinigita per tri ideo-

gramoj *bing ji ling* (*bing* signifas glacieron, dume *ji-ling* estas analoga sono de "cream"). Tamen, tiaj vortoj estas tre raraj.

Kelkfoje, pro tio, ke iu fremda vorto estis misprononcata de la tradukinto, ĝia laŭprononce ĉinigita ekvivalento nature fariĝis erara, ekz., la angla vorto "greenwich" estis erare ĉinigita kiel *gelinweizhi*, ĉar la tradukinto ne rimarkis, ke la litero "w" en tiu vorto estas silenta (neprononcata). Tiu tradukita vorto validis por longa tempo, nur antaŭ kelkaj jaroj oni trovis, ke necesas korekti la eraron, kaj ĝin ĝustigis.

La okcidentaj kaj japana lingvoj ankaŭ iagrade influis la frazeologion de la ĉina lingvo. Sed temas pri tre komplika kaj nefacile klarigebla problemo, mi simple mencias kaj ne traktas ĝin en tiu ĉi artikolo.

En la ĉina lingvo ankaŭ troviĝas fremdaj influoj devenintaj de la naciminoritatoj, ekz., en Pekino, la mallarĝa strateto estas nomata *hutong*, tiu nomo ja devenis de la mongola lingvo. Kaj la ĉina vorto *bazha* (bazaro) devenis de la uĝura lingvo, kiu pruntis ĝin el la persa aŭ araba. Sed tia influo estas tre malgranda.

Daŭras la evoluado de la ĉina lingvo kaj ankaŭ la ensorbado de fremdaj vortoj. Nun ni havas en nia lingvo novajn vortojn kiel *ji-guang*, (stimulita lumo) por la vorto lasero tradukita laŭsence kaj *leida* por radaro ĉinigita laŭprononce.

Estas konstatite, ke la fremdaj influoj ja ludis pozitivan rolon en la evoluado de la ĉina lingvo. Multe dank' al la fremdaj influoj, la maljuna ĉina lingvo grandpaŝe evoluis kaj modernigis. Ĝi fariĝis pli riĉa, pli perfekta kaj pli kompetenta kiel la komuna interkomunikilo de 1.2 miliardoj da diversnaciaj loĝantoj en tiu vasta lando. ■

1. Ekde 1840, Britio lanĉis agresan militon kontraŭ Ĉinio por perforte devigi la ĉinan registaron doni permeson al ĝi vendi opion en Ĉinio. Tiu

# Iom pri sengrasigo

**E**N iu hospitalo de Pekino mi renkontiĝis kun knabino, 152 cm. alta kaj 39 kg. peza. Jam maldika, ŝi tamen opiniis sin grasa kaj alprenis multajn sengrasigajn rimedojn. Ŝi ne prenis rizon nek farunaĵon. Ŝi prenis nur malgrandan kvanton da legomoj kaj elbuŝigis ilin tuj post maĉado. Samtempe ŝi prenis sengrasigan teon kaj laksigan drogon. Fine ŝia korpopezo reduktiĝis al 27 kg. Tiam ŝi jam estis osteca, neniom brila sur la seka haŭto, kaj suferis seriozan senapetitecon.

Fakte, la knabino tute ne bezonis sengrasigon. Pri sengrasigo ŝi havis miskomprenon. Oni devas konfesi, ke en Ĉinio estas multaj homoj, kiuj bezonas sengrasigon. Primara statistiko raportis, ke en Ĉinio estas 70 milionoj da korpulentuloj, kaj plie, daŭre kreskas la nombro. Kia sengrasiga metodo taŭgas al ĉinaj korpulentuloj, tio estas multe atentata en Ĉinio.

Nemalmultaj fakuloj renomaj en la ĉina medicina rondo opinias, ke konduki la korpulentulojn el la miskompreno estas plej grave, por ke ili ne ripetu la eraron, faritan de la supre menciita knabino. Laŭ la fakuloj estas du miskomprenoj:

Unue, iuj opinias, ke sengrasigo estas identa kun redukto de korpo-

pezo. Fakte, ne ĉiuj pezaj homoj bezonas sengrasigon. Ekz. sportistoj, ĝenerale dirite, estas pli pezaj ol aliaj homoj, tamen ili ne bezonas sengrasigon, se nur estas normalaj iliaj diversaj san-normoj. Fakuloj opinias, ke ju pli multa estas graso en la korpo, des pli malutila ĝi estas al la sano. En Ĉinio cirkulas popoldiro: "Ju pli longa la zono, des pli mallonga la vivdaŭro." Sekve, sengrasiga rimedo celas ne nur forigi la superfluan grason el la korpo, sed ankaŭ normaligi aŭ sveltigi la korpon.

Due, multaj korpulentuloj elektas sengrasigan rimedon laŭ rapideco de ĝia efiko. Tio estas erara, ĉar akvo konsistigas 60% de la pezo de la homa korpo. Estas facile redukti korpopezon en mallonga tempo, sed malfacile longe teni la efikon kaj gardi la fizikan forton, energion, imunecon kaj psikon en sana stato.

Ĉu estas efikaj sengrasigaj rimedoj en Ĉinio? Objektive, la ĉinaj medicinaj rondoj, precipe la ĉin-medicinaj rondoj, faris multjaran esploradon, rikoltis certan progreson en kuracado de korpulenteco per tradiciaj ĉinaj medikamentoj kaj akiris klinikajn spertojn. La ĉinaj medicinistoj analizis la kaŭzojn de korpulenteco kaj resumis ilin en tri flankoj, nome perturbo

de liena kaj stomaka funkcioj; manko de hepata vitala energio, stagnado de la vital-energia cirkulado kaj koaguliĝo; kaj manko de rena vitala energio. Sekve, por kuraci korpulentulojn ĉin-medicinistoj unue tonikigas vitalan energion kaj aktivigas sango-fluon al ili. Tiaokaze ofte uzataj estas ĉin-medicinaj drogoj, akupunkturo kaj mokso, premado de akupunkturaj punktoj, *ĉigong-o* k.a.

Kvankam estas medikamentoj kontraŭ korpulenteco, tamen pli ofte la kuracistoj preskribas medikamentojn konforme al malsamaj malsanuloj. Ekz., kuraci la malsanulojn suferantajn de gastroentera perturbo kaj manĝegemulojn per kontraŭstomakobruhumaj drogoj, cele normaligi ilian apetiton kaj forigi malsatecon; kuraci la korpulentulojn suferantajn samtempe de laco, anhelado, ŝvitozo kaj brusto-sufokiĝo per lienosanigaj, diurezigaj kaj antikoagulaj medikamentoj. Laŭ la simptomoj de malsanuloj estas necese uzi kompondajn receptojn. Ĉin-medicinaj fakuloj, esplorinte tradiciajn ĉin-medicinajn receptojn, faris novajn medikamentojn por kiel eble plej bone atingi la idealan efikon en kuracado de korpulenteco. Prof. Wei Kaiyuan, kiu atingis bonan sukceson tiurilate, diris al

milito daŭris ĝis 1842 kaj Ĉinio malvenkis.

2. En tiu ĉi artikolo, la cititaj ĉinaj vortoj aperas en siaj latinigitaj formoj kaj la latinaj literoj kursivigitaj.

3. Meiji estis la titolo de japana imperiestro, kiu estis sur la trono en 1867-1912.

4. Ekde antikveco la japanoj adoptis multnombrajn ĉinajn ideogramojn en sia lingvo. Nun la nombro de ideogramoj en la japana lingvo estas limigita, kaj fremdaj vortoj estas laŭprononce japanigitaj per la japana alfabeto katakana.

5. Estas interese rimarki, ke ĉinoj kaj

japanoj ofte uzas la samajn ideogramojn sed en malsamaj prononcoj. La ĉefurbo de Japanio estas nomata "Tokio" de japanoj, sed de ĉinoj *Dongjing*, kvankam la du ideogramoj por tiu nomo estas tute samaj en ambaŭ lingvoj.





Korpulentulino kuracata per akupunkturo



Ili faras sengrasigan gimnastikon.

mi, ke ideala sengrasiga terapio devas esti efika; efika sur la eksteraj organoj, sed ne sur la centra nerva sistemo; havanta malmultan aŭ tute ne havanta drog-rezistecon; kaj malmultekosta kaj oportuna.

Akupunkturo kaj mokso povas bonordigi la endokrinan funkcion de korpulentuloj, cele inhibicii ilian apetitan trofunkciadon. Klinika praktiko montris, ke akupunkturo kaj mokso estas plej efikaj por kuraci korpulentulinojn. Ĉar korpulentulinoj plejparte suferas de endokrina perturbo, amenoreo k.a. Ginekologino Chen Xiang de Pekino kuracas korpulentulinojn per akupunkturo sur aŭrikloj kaj atingis bonan efikon. Post trimonata kuracado, ordinara malsanulinoj malpeziĝis je 1-5 kg. Krome akupunkturo kaj mokso estas sekuraj, kun neniu malutilo.

Laŭ la tradicia ĉina medicino "Perturbo de vitala energio kaŭzas diversajn malsanojn", korpulenteco kaŭziĝis de mukaĵo, diurezo, malforteco kaj koagulaĵo, kiuj ĉiuj koncernas vitalan energion. Ekz., stagno de vitala energio kaŭzas koaguliĝon, nesufiĉo de vitala energio — mankon de sango, malordo inter vitala energio kaj sango — hipertension, kormalsanon, diabeton kaj aliajn komplikaĵojn de korpulenteco. Tial oni kuracas korpulentulojn per *ĉigong*-terapio por normaligi ilian psikan staton, bonordigi la funkciojn de organismaj organoj kaj ordigi spiradon, glatigi la *ĝinglŭo*-vojojn en la homa korpo, aktivigi sangofluon kaj forigi koagulaĵojn, plenigi vitalan energion de stomako kaj fortikigi lienon kaj renojn, por ke la kuracatoj estu sanaj kaj sveltaj. *Ĉigong*-terapio distingiĝas per tio, ke dum

sengrasigado la malsanuloj prenas malpli multe da manĝaĵo, dum ili estas pli energiaj. Nun pluraj sengrasigaj *ĉigong*-terapioj atingis bonan efikon en kliniko. Menciindas, ke malsanuloj devas elekti kompare kompletajn kaj perfektajn *ĉigong*-terapiojn kaj sin ekzer-ci sub gvidado de kuracistoj.

Iuj ĉinaj nutradistoj provas kombini la tradiciajn ĉinajn kuracrimedojn kun la progresaj okcidentaj sengrasigaj rimedoj en kliniko. Analizinte tion, prof. Yang Qinghui de Pekino opiniis, ke krom "malekvilibro inter la asimilita energio kaj la konsumita energio", la teoria bazo pri sengrasiga terapio devas ampleksi ankaŭ "liveri sufiĉan nutron bezonatan de la organoj" kaj "kuraci laŭ la simptomoj". En kuracado de korpulenteco li alprenis terapiojn de "tromalalta kaloria dieto (200-800 grandaj kalorioj ĉiutage)" kaj "malaltkaloria dieto (800-1 200 grandaj kalorioj ĉiutage)", de konduto-ĝustigo, sportado, okcidentaj medicinaĵoj kaj aliajn modernajn terapiojn. Li kuracas ankaŭ per drogoj, akupunkturo kaj mokso, aŭrikl-premado kaj *ĉigong*-o. Laŭ malsamaj simptomoj kaj en malsamaj periodoj de la sama malsanulo li alprenas diferencajn kuracrimedojn. Nun rimarkinde reduktiĝis graso en la korpo de la malsanuloj kuracataj en lia hospitalo, ilia malsano malgraviĝis aŭ malaperis la komplikaĵoj, kiaj grasa hepato, hipertensio kaj hiperlipemio. Post malgrasigo la fizika forto, intelekto, imuneco k.a. de la malsanuloj status same kiel tiuj antaŭ la kuracado. Iuj malsanuloj ĉesigis la kuracadon antaŭ 5 jaroj kaj ilia korpo ne plu peziĝis.

Forlasinte la hospitalon de prof. Yang, mi sentis, ke oni spertis interesan ŝanĝiĝon en la vidpunkto pri dikeco kaj maldikeco de homoj. Antaŭe malgrasuloj enviis la korpulentulojn kaj nun male la lastaj envias la antaŭajn. Post peniga sengrasigo oni ŝajne ekkomprenis, ke oni ne devas sendistinge preni la sengrasigaĵojn. Tiaokaze oni devas viziti bonan kuraciston, kia prof. Yang. ■

# Tibetaj moroj

**A**NTAŬ kelkaj jaroj mi eklaboris en Tibeto, la tegmento de la mondo. Post nelonge mi profunde sentis, ke la tibetanoj tre kapablas vivi en malfaciloj. La neordinaraj moroj de tibetanoj montras, ke ili ĉiam adaptiĝas al la medio kaj amas la naturon.

## SEKIGITA VIANDO

En la loko 4 000-5 000 m super la marnivelo ne kreskas grenplantoj, legomoj kaj fruktarboj. La tieaj tibetanoj manĝas ĉefe bovaĵon, ŝafaĵon kaj laktaĵon. Sur la altebenaĵo mankas oksigeno kaj viando ne povas esti bone kuirita pro malalta atmosfera premo. Pro tio la tibetanoj manĝas krudan viandon. Novembre, kiam frostas, tibetanoj elektas freŝan viandon, tranĉas ĝin en longajn pecojn, sekigas kaj konservas ilin por manĝi en la venonta jaro. Sekigita viando estas bongusta kaj nutroriĉa.

Foje, mi vidis, ke tibeta ŝoforo manĝas sekigitan ŝafaĵon kun osto per tranĉilo. Mi gustumis peceton da ŝafaĵo. Mi sentis, ke ĝi estas bongusta kiel rostita fiŝpeco.

Viandmanĝema tibetano ĉiutage trinkas almenaŭ 30 glasojn da buterteo, kiu helpas digestadon kaj donas diversajn vitaminojn. La altproteinaj manĝaĵoj, kiaj sekigita viando, buterteo kaj laktaĵo, estas facile konserveblaj kaj porteblaj por nomadoj.

Kun scienc-teknika disvolviĝo iuj legomoj povas esti kulturataj sur altebenaĵo. Kiel alilokanoj, tibetanoj prenas rizaĵon, pladojn, *ĝjaŭzi*-ojn (farĉita farunaĵo) kaj vermiĉelojn. Plejparto de la tibetanaj familioj uzas premmarmiton por stufi viandon. Sed la moro manĝi sekigitan viandon ankoraŭ konserviĝas.


## KUN BRUTA FEKAĴO KIEL BRULAĴO

Okcidenten veturante laŭ la rivero Yarlung Zangbo, ni rimarkis, ke sur la tegmentoj de loĝdomoj ambaŭflanke de ĝi amasiĝas fekaĵo de bovo kaj ŝafo.

De dommastro preparanta por mi buterteon mi



Sekigo de viando



Sunenergio uzata en familio

informiĝis, ke en plejparto de Tibeto ne kreskas arboj kaj sur stepoj bovoj kaj ŝafoj paŝtigas. De longa tempo fekaĵo de bovo kaj ŝafo estas uzata kiel brulaĵo. Tibetanoj sekigas ilian fekaĵon sur la tegmento de sia domo kaj konservas ĝin por estonta uzado. Por paŝtista familio pli da fekaĵo signifas pli da bovoj kaj ŝafoj, kaj eĉ pli da riĉaĵoj. En la paŝtejo la paŝtistoj konstruas muron el bruta fekaĵo ne nur por sin defendi, sed ankaŭ por faciligi la hejtadon. Brulanta fekaĵo neniom malbonodoras.

Nun en Tibeto oni uzas karbon, sunenergion, ventenergion k.a. Tamen bruta fekaĵo ankoraŭ estas uzata en multaj lokoj. Kiam mi vizitis vilaĝon, mi lernis kuiri per fekaĵo kaj trovis, ke ĝi facile brulas kaj ne poluas la medion. Tiel, mi bone komprenis, kial la tiea sekigita bruta fekaĵo estas uzata ne nur kiel donaco, sed ankaŭ kiel varo en foiro.

## VIVMORTIGO SEVERE MALPERMESITA

Antaŭ 4 jaroj iu kadro, kiu venis el alia provinco, kaptis leporon kaj preparis pladojn el ĝia karno por regali lokajn kadrojn. Pro tio li estis forte riproĉita.

La tibetanoj severe malpermesas vivmortigon. Ili rigardas birdon kaj fiŝon kiel diojn. Kiu manĝas hundaĵon aŭ ĉevalaĵon, estas ne bone traktata por eterne.

Foje nova gvidanto de Nyanang-gubernio venis al la piedo de Xixabangma-montpinto. Loka kadro plendis al li: "Ĉiuvespere pli ol 40 sovaĝaj azenoj manĝas sekalon sur kampoj..." La gvidanto diris: "Nia gubernio apartenas al la naturparko Qomolangma. Ni devas protekti grenplantojn laŭeble, sed ne vundi sovaĝajn bestojn." Fakte, la vilaĝanoj faris nenion alian ol tion. Sur sekaj kampoj ili starigis

ŝtonajn homojn por fortimigi birdojn kaj sovaĝajn azenojn kaj ĉirkaŭigis kampojn per ŝnuro kaj drato.

Lastsomere neĝleopardoj, ŝakaloj kaj lupoj mordmortigis 15 bovojn kaj 30 ŝafojn kaj ursoj detruis hektarojn da maizkampoj. Sed lokanoj ne vundis eĉ unu beston.

Pro la supre dirita malpermeso Nyanang-gubernio fariĝis paradizo de neĝleopardoj, linkoj, gazeloj, aproj, ruĝvertaj grupoj k.a.

## PUREMA NACIO

Antaŭe mi aŭdis, ke tibetanoj ne lavas al si la vizaĝon. Sed nun mi scias, ke ili faras tion devigite.

Mi vizitis kelkajn vilaĝojn de la norda Nyanang-gubernio. Tie la klimato estas seka kaj sunbrilo — forta. Eksterdome, ultraviolaj radioj vundas haŭton. Se oni ĉiutage lavas al si la vizaĝon, la haŭto difektiĝas. Iu han-nacia kadro, kiu laboris en Tibeto jam 30 jarojn, diris al mi, ke antaŭ ol iri eksteren, oni devas ŝmiri la vizaĝon per butero kaj ankaŭ per iom da koto. Nun la tieaj kondiĉoj pliboniĝis kaj aŭtoj ĉie servas. Tamen oni ankoraŭ uzas beleco-kremon por ŝirmi la vizaĝon kontraŭ sunbrilo.

Vivante inter tibenanoj, mi rimarkis, ke ili estas belemaj kaj puremaj, precipe la knabinoj, kiuj ne nur lavas al si la vizaĝon ĉiutage, sed ankaŭ ofte uzas ŝampon kaj parfumon. Ĉiun julion laŭ la tibeta kalendaro, la tibetanaĵoj festas la tradicion banfeston. En tiu tago, kun sekalvino, buter-teo kaj sekigita viando ili venas al riverbordo kaj starigas tie sunombreton aŭ tendon. Poste ili sin banas en la rivero kaj ilia gajeco daŭras de mateno ĝis vespero. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* S-ro Duan Yongxing, estro de la Muzika Lernejo Nie Er, deziras kontakti kun tutmondaj esperantistaj muzikistoj, precipe tiuj el Orienta Eŭropo. Adr.: 31, Xiba Xincun, 650031 Kunming, Yunnan, Ĉinio.

\* Aleksandr, 19-j., dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj, speciale pri matematiko, komputiloj kaj muziko. Adr.: Krasnojarsk-77, P.O. kesto 8925, 660077, Rusio.

\* Eŭropaj viroj deziregas edziĝi kun azianoj. Skribu al: Agence Locufier, 85 Avenue Liberté, F 59831 Lambersart Cedex, Francio.

\* S-ro Fulvio Scarpa dez. kor. tutmonde kun kristanaj pastro-lernantoj. Adr.: Fondo Versace, Reggio Calabria, Italio.

\* Islam Nurizade, 24-j. studento, dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj. Adr.: Sabalan n-ro 24, Kuye Sahand, Elgoli, Tabriz, Iran.

\* Raimundo Francisco de Oliveira, instruisto de E-grupo, dez. kor. kun ĉinaj gesamideanoj (15-60-jaraj) pri diversaj temoj, precipe pri interŝanĝo de pm., libroj, diskoj, sportoj, pk. kaj muziko. Respondoj estas garantiataj. Adr.: Rua 143, Cs 65, 1a Etapa - Cony. Ceara, 60530-210-Fortaleza, Ceara, Brazilo.

# EN ĜARDENO DE



**A** PARTE ĉarmas tropika pejzaĝo en la regiono Xishuangbanna de Yunnan-provinco: Prosperaj olepalmoj, fruktoriĉaj kokosarboj kaj verdaj ĝardenoj de kaŭĉukaj arboj.



Novaj loĝdomoj de kultivistoj

## KAŬĈUK-KOLEKTANTO

Mateniĝis, kiam mi venis en ĝardenon de kaŭĉukaj arboj de Xishuangbanna. Ĉie tie aromis freŝa aero kaj susuradis arbofolioj. Post kelka tempo mi vidis junulon kun lampo sur la frunto.

La junulo kolektis kaŭĉukon en la kultivejo Jinghong (Ĝinghong) jam ses jarojn. Tiam li senĉese laboris, kvankam tutkorpe ŝvitinta.

De li mi informiĝis, ke 7-8 jaroj necesas por plenkreskigi kaŭĉukan arbidon. Ĝi donos kaŭĉu-

kon por 30-40 jaroj, dank' al zorgegema flegado.

Je la momento li faris per tranĉilo arkan breĉon sur kaŭĉuka arbo kaj elfluis el ĝi kaŭĉuko laŭ longa fera lameno en ujon fiksitan sur la trunko.

Vidinte, ke li ripetis la movon, mi demandis, ĉu la laboro estas monotona. Anstataŭ respondi per jes aŭ ne, li rakontis al mi sian ĉiutagan laboron. Ĉiutage kaŭĉuk-kolektanto nepre komencas labori antaŭ la sunleviĝo kaj finlaboras ĉ. la oka, alie kaŭĉuko koaguliĝas en sunvarmo. Ĉiu kolektanto, tutsole laboras sen paroli dum kelkaj horoj, farante breĉon sinsekve sur 300-400 kaŭĉukaj arboj. Poste, li reiras laŭ la irita vojo, verŝas kaŭĉukon el la ujoj en sitelojn kaj vektoportas ilin for de la kultivejo. Fine, oni grajnigas la kaŭĉukon en elektra forno. Jen pretiĝas norma kaŭĉuko.

Ĉu oni povas fari plurajn breĉojn sur sama arbo en unu tago? La respondo estas nea. Kiel li diris, ankaŭ kaŭĉuka arbo bezonas sin nutri. Ĝenerale, oni faras breĉon sur unu arbo unufoje en unu aŭ du tagoj. Antaŭe, laŭ opinio de fakuloj, absolute ne eblis kreskigi kaŭĉukajn arbojn norde de 17°N. Sed fakte, en la regiono Xishuangbanna (inter 21°N-23°N) oni sukcese kreskigas tiajn arbojn

en pli kaj pli granda skalo. Tamen, en la malalt-temperatura periodo, t.e., de decembro, en kiu defalas la folioj de kaŭĉukaj arboj, ĝis aprilo, en kiu plene prosperas freŝaj folioj, oni devas ĉesigi kolektadon de kaŭĉuko.

## KULTIVEJO DE KAŬĈUKAJ ARBOJ

Kiel aliaj samspecaj ŝtataj kultivejoj en la regiono, Jinghong-kultivejo de Kaŭĉukaj Arboj kun 14 000 laborantoj ekfunkciis en 1956. Post kelkdekjara ekspluatado sur la antaŭe dezertaj montoj etendiĝas nun maro de kaŭĉukaj arboj, tiel ke la regiono fariĝis la dua bazloko de kaŭĉuko de Ĉinio (la unua en Hainan-provinco). Pro ekskluziva kulturado de kaŭĉukaj arboj kaj grenplantoj kaj pro neperfekta administrado la kultivejo ne havis bonan profiton dum longa tempo.

En la pasintaj jaroj la kultivejo aliĝis aspekte. Krom plialtigi la lertecon de laboristoj en kulturado de kaŭĉukaj arboj, kolektado de kaŭĉuko kaj ties prilaboro, ĝi alprenis ankaŭ sciencan administradon kaj novajn teknikojn. De 1989 oni stimulas maljunajn kaŭĉukajn arbojn per 2-kloroetilo por ricevi pli da kaŭĉuko. Dank' al tio, la kultivejo pliproduktis sekigitan kaŭĉukon je 300 tunoj en la jaro. En 1995 la kultivejo kulturis sume 13 400 hektarojn da kaŭĉu-

# KAŬĈUKAJ ARBOJ



kaj arboj kaj produktis 19 000 tunojn da sekigita kaŭĉuko, je 387.6% pli multe ol la produktokvanto en 1978. Ĉiu kaŭĉuka arbo produktis meznombre 6.5 kg da sekigita kaŭĉuko.

Nun, krom kulturi kaŭĉukajn arbojn kaj grenplantojn, la kultivejo entreprenas ankaŭ komeron, transporton, konstruon kaj turismon. Per tio ĝi gajnis rimarkindan profiton kaj ne plu suferas de defecito.

## EN VILAĜO DE HANI-OJ

En la regiono Xishuangbanna vivas taj-oj kaj aliaj nacimalplimultanoj. Mi venis en vilaĝon de hani-oj. La vilaĝo, kiu portas la nomon Aksin, situas en montaro. Ĝi estas atingebla per simpla ŝoseo.

En la vilaĝo estas elementa lernejo kun brikaj domoj kaj la loĝdomoj de la vilaĝanoj estas lignaj. Kvieteco regis en la vilaĝo. Sur balkonoj maljunuloj ion sunumis. En multaj kortoj ĉarmis fruktoplenaj ananasarboj, pampelmusarboj, liĉiarboj k.a. "La junuloj de la vilaĝo nun kolektas kaŭĉukon en montoj," diris al mi mezaĝulo vektportanta kaŭĉukon. "Ĉe ni ĉiuj familioj kulturadas kaŭĉukajn arbojn kaj ili komencas labori ĉe mateniĝo." Mi sekvis lin al ties hejmo.

Duetaĝa domo. La malsupra

estis destinita por brutoj kaj agrikulturaj laboriloj. En la supra lokiĝas vasta salono kaj dormejoj. En la salono staras ŝrankaro, sofoj, televidilo, diktafono kaj fajrejo. La supra trabo nigriĝis de fumado kaj sur ĝi pendis peklita viando.

"Bonvenon, bonvenon! Sidiĝu sur la balkono!" Eble li trovis, ke al mi ne plaĉas malhela ĉambro, kaj kondukis min sur la balkonon kun du taburetoj en la manoj.

"Gustumu nian mangon," li proponis al mi freŝajn mangojn.


La mezaĝulo nomiĝas Mai Yaluo kaj aĝas 44 jarojn. La familio havas kvar membrojn: la geedzoj kaj iliaj du infanoj.

Li konfesis, ke antaŭe lia familio estis tre malriĉa. Ili posedis kabanon, littukaĉon, kaldronon kaj kelkajn bovlojn. En 1985 li lernis kulturadon de kaŭĉukaj arboj en kurso funkciigata de proksima ŝtata kultivejo. Post la lernado, li kulturis 2 000 kaŭĉukajn arbojn. La familio enspezis 36 000 juanojn en la pasinta jaro. Krom kaŭĉukaj arboj, lia familio kulturis ankaŭ 600 mangarbojn, 8 000 ananasarbojn, rizon kaj legomojn. Inter kaŭĉukaj arboj estas kulturataj ankaŭ tearboj, piprarbedoj kaj kafarboj.

Laŭ regulo difinita de la loka registaro, la kamparanoj devas pagi imposton post tri jaroj de

kiam la kaŭĉukaj arboj donas kaŭĉukon. Por ordinaraj familioj jam sufiĉas la enspezo el kulturado de 2-3 kaŭĉukaj arboj por imposto. Tiu politiko de imposto pligrandigis la aktivecon de kamparanoj en kulturado de kaŭĉukaj arboj. En la regiono la kamparanoj kulturadas sume 94 000 hektarojn da kaŭĉukaj arboj.

Bedaŭrinde, al mi mankis tempo esti en kamparana ĝardeno de kaŭĉukaj arboj. Mi supozis, ke ankaŭ ĝi estas maro de verdaĵo. ■




Kolektado de kaŭĉuko

### EKONOMIO

- Ekfunkciis la pasaĝera trajno "Pioniro" inter Ŝanhajo kaj Nankino kun maksimuma rapido de 140 km/h. La veturado daŭras 2.48 horojn, je 1.11 horoj pli rapide ol la antaŭa plej rapida trajno inter ambaŭ urboj.

- Ĉinaj kamparanoj bredas fiŝojn, salikojn, krabojn, testudojn k.a. en pli ol 1.2 milionoj da hektaroj da rizkampoj. Kaj per iliaj ekskrementoŝoj ili pliigis la produktokvanton de rizo.



Malgranda akvokonservejo en Henan-provinco

- En Ĉinio estas 84 600 akvokonservejoj, kiuj ĉiujare liveras ĉ. 500 miliardojn da kubmetroj da akvo kaj irigacias 16 milionojn da hektaroj da kampoj. Ili ankaŭ estas grava akvofonto por la vivo kaj produktado de urbanoj kaj kamparanoj.

- Kamparanoj de Shouguang-gubernio, Shandong-provinco, energie disvolvis fortojn kaj aliajn legom-kultivajn teknikojn. Dank' al tio, la gubernio fariĝis la plej granda legom-bazo kaj pogranda legom-bazaro de Ĉinio kaj nombro da kamparanoj lernigas legomkulturadon en aliaj landoj.

- Ĉinio kun 6.5 milionoj da esamenoj ĉiujare produktas pli ol 170 000 tunojn da mielo kaj eksportas 100 000 tunojn da mielo.

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Ĉinio elfaris orbito-transigan raketan

motoron de satelito. Estonte ĉina raketo povos sendi sateliton al malalta aŭ alta orbito laŭ bezono de mendanto. Tiu tekniko levos la konkurpovon de Ĉinio en la monda satelit-lanĉa merkato.

- Por solvi la mondiskalan problemon pri "blanka poluado" fare de agrikultura termembrano la kemia fakultato de Tianjin-universitato kaj aliaj elfaris novan membranon, kiu havas foto- kaj biokatabolojn.

Oni pruvis, ke tia termembrano povas disrompiĝi en pecetojn, ĉiu kun malpli ol unu kvadrata centimetro, kelkan tempon post uzado. Ili ne malutilas al grenplantoj nek poluas la medion. La membrano estas uzebla ankaŭ por pakado, farado de sakoj por varo kaj rubo.

- En la 6-a, 11-a kaj 13-a de aprilo ĉi-jare Zijinshan(Ziĝinŝan)-observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj ĝia dependa Qingdao-observatorio trifoje sukcese observis la nuklean fendigon de la kometo Momotake. Tio havas gravan sciencajn signifon por esplori la evoluon kaj pereon de kometo.

### ARKEOLOGIO

- Dank' al penado de ĉinaj kaj japanaj arkeologoj, la malnova urbo Jiaohe (Ĝjaŭhe), je 10 km okcidente de Turpan, Xinjiang (Ŝingjang), parte reakiris sian originan fizionomion.

La nomita urbo ekestis antaŭ 2 300 jaroj. En



Legom-forcejo en Shouguang-gubernio

ĝi troviĝas nemalmultaj ruinoj de konstruaĵoj ekzistantaj inter la 3-a kaj 10-a jc. Ĝi estas bone konservita ruino. En la rekonstruita urbo estas turismaj itineroj, gvidmarkoj kaj 710-metra digo por protekti la urbon.

- Lastatempe ĉinaj arkeologoj prifosis ruinon de vilaĝo ekzistanta antaŭ 5 000 jaroj sur Nanya-insulo de Hongkong, trovis tie grandan nombron da ceramikajpecoj kaj ŝtonaj iloj kaj per tio neis la aserton, ke la prauloj de Hongkong loĝis surŝipe.

### KULTURO

- Nun multaj ĉinaj familioj turnis sian intereson al kolektado.

Tiuj familioj havas abundajn kolektaĵojn, kiaj kaligrafaĵoj, pentraĵoj, moneroj, poŝtmarkoj, magnetaj kartoĵoj, alumet-markoj, cigaredo-markoj, vin-servicoj, insignoj, groteskaj ŝtonoj, radiko-skulptaĵoj, ŝipmodeloj, horloĝoj, porcelanaĵoj, gazetoj, ĵurnaloj, eniraj biletoj, novjaraj bildoj kaj filmaj afiŝoj.

### MEDICINO

- Hospitalo en nordokcidenta Ĉinio sukcese fortranĉis al suferanto kranibazan tumoron 210 g pezan. Tio estas senprecedenca en la mondo.

### MEDIPROTEKTO

- Ĉinaj kaj usonaj fakuloj trovis subspeciajn guemulojn vivantajn sole en Ĉinio sur la altebenaĵa stepo je 4 500 m super la marnivelo en Sangri-gubernio, Tibeto, kaj per tio ili renversis la konkludon, rekonitan de la okcidenta biologa rondo, ke la subspecia guemulo jam pereis en Tibeto. Nun oni jam starigis tie naturparkon de subspeciaj guemuloj.

- En la Yunnan-a centro de primatoj, starigita antaŭ dek jaroj, vivas pli ol 4 500 primatoj de ok specioj. Ĝis nun la centro eksportis al Usono, Britio, Svedio, Germanio, Francio kaj Japanio 4 700 resusojn kaj aliajn bonrasajn primatojn.

- Antaŭ 60 milionoj da jaroj strutoj vivis ĉie en Eŭrazio. Tamen oni ne sciis, kiam strutoj pereis en Azio.

Nun Ĉinio konstruis 110 bredejojn de stru-

toj grandajn kaj malgrandajn, en kiuj vivas pli ol 15 000 strutoj. Bredado de strutoj estas unu el la gravaj novaj laboroj de Ĉinio en la 90-aj jaroj.

- Taksuso, la plej maljuna arbospecio sur la terglobo, estas sukcese kulturata en la Huanren-a Manĉura Aŭtonoma Gubernio de Liaoning-provinco, Ĉinio. Taksuso estas nomata "viva fosilio" en la vegetala regno. Kaj taksusalkoholo estas tre valora por kuraci kanceron.

### SOCIO

- Ŝanhajo havas 14 milionojn da loĝantoj, el kiuj 2.3 milionoj estas maljunuloj.

En la lastaj jaroj diversaj socitavoloj de la municipo donis al 250 000 maljunuloj ateston pri favoraĵoj, per kiu ili ĝuas privilegiajn servojn.

### TURISMO

- La submara "Akvario Shengya de Dalian", kune konstruita de Ĉinio kaj aliaj lando kaj regiono, estas bonvena al turistoj.

Ĝi estas septita per grandega premrezista vitrobudo. En la akvario kun 4 000 tunoj da speciale traktita marakvo naĝas 7 000 fiŝoj, salikoj, kelonioj kaj kraboj de pli ol 200 specioj, super kaj ambaŭflanke de turistoj.



Junie en Pekino okazis la Internacia Ekspozicio de Aŭtoj. Jen parto de la ekspozicio.

# Aboco de vejĉi-ludo

**V**EJĈIO originis de Ĉinio. La elterigitaj vejĉi-tabuloj montras, ke en la pasintaj miloj da jaroj iom post iom multiĝis ne nur la linioj sur vejĉi-tabulo, sed ankaŭ la ludŝtonoj kaj ludmanieroj. Nuntempe vejĉio prosperas kun multaj lertaj ludistoj kaj diversaj skoloj. Sube mi konigos al niaj legantoj fundamentajn regulojn de vejĉi-ludo.

## VEJĈI-TABULO KAJ ŜTONOJ

Vejĉi-tabulo estas formita el 19 horizontalaj kaj 19 vertikalaj linioj, kun 361 krucpunktoj (Diagramo 1). Por indiki pozicion de ŝtono, oni faris signon sur la vejĉi-tabulo per naŭ punktoj ● nomataj "steloj". La centra stelo nomiĝas "Tjanjŭan". Kun tiuj steloj la vejĉi-tabulo estas dividita en naŭ partojn: maldekstra supra angulo, maldekstra malsupra angulo, dekstra supra angulo, dekstra malsupra angulo, supra flanko, malsupra flanko, maldekstra flanko, dekstra flanko kaj centro.

Ĉiu el la kvar limlinioj nomiĝas "la unua linio"; de limlinio al la centro laŭvice estas la dua linio, la tria linio ktp.

La ŝtonoj de unu flanko estas nigraj, kaj tiuj de la alia — blankaj. Ĉiu flanko havas 180 ŝtonojn.

## REGULOJ DE ŜTON-METADO

La nigra flanko metas ŝtonon la unua. La ŝtono devas esti metita sur krucpunkton. Estas malpermesite ŝanĝi pozicion de la metitaj ŝtonoj. La ludo iras per alterna metado de la ŝtonoj sur la liberajn krucpunktojn (Diagramo

2). Kiam sur la vejĉi-tabulo troviĝas jam neniu libera krucpunkto inter la teritorioj de la du flankoj, tiam finiĝas la ludo.

## VENKO KAJ MALVENKO

Ĉar sur la vejĉi-tabulo estas 361 krucpunktoj, ĉiu el la du flankoj devas okupi 180.5 krucpunktojn. Ĉe la fino de la ludo venkas tiu flanko, kiu okupas pli multe ol la difinitan nombron. Se ĉiu flanko okupas ĝuste 180.5 krucpunktojn, tio signifas egaligon.

Ĝenerale por la nigra flanko, kiu ĝuas privilegion ŝtonmeti la unua, estas pli facile gajni favoran situacion en la ludo. Por garantii justecon de la rezulto, oni difinis la regularon:

1. Kiu uzu la nigrajn ŝtonojn por meti la unua? Unu el la du ludantoj laŭvole prenu amason da ŝtonoj (ĝenerale blankaj) en manon, la alia divenu, ĉu la nombro estas para aŭ nepara. Se li pravas, li uzu la nigrajn ŝtonojn por meti la unua. Alie, lia rivalo metu nigran ŝtonon por komenci la ludon.

2. Ĉe la fino de la ludo, kiam oni kalkulas la okupitajn teritoriojn (krucpunktojn) de la du flankoj, oni devas subtrahi 2.75 krucpunktojn el tiuj, kiujn la nigra flanko okupas. Ekz., se la nigra flanko okupas 184 krucpunktojn, ĝia venka rekordo fakte estas 0.75 krucpunkto. Se la blanka flanko okupas 178 punktojn, ĝi fakte venkas per 0.25 krucpunkto.

3. En vejĉi-ludo troviĝas ankaŭ "egalrajteco": a) Por iom malpli lerta ludanto sufiĉas, ke li uzu la nigrajn ŝtonojn. Fine de la ludo oni ne subtrahas 2.75 el la de li

okupitaj krucpunktoj. b) Por ludanto multe malpli kapabla oni aranĝas antaŭajn metojn de difinitaj nigraj ŝtonoj sur la "stelojn". Kaj la blanka flanko ŝtonmetas la unua. Ĉe la fino oni subtrahas la difinitajn krucpunktojn el tiuj, kiujn la nigra flanko okupas.

## NECESAJ KONDIĈOJ POR SEKURIGI LA ŜTONOJN

### 1. "Spiro" kaj ŝtonkaptado

"Spiro" signifas liberan krucpunkton ĉe la okupita teritorio garantiantan la sekurecon de la metitaj ŝtonoj. Ju pli multaj "spiroj", des pli multaj la eblecoj por sin sekurigi. En diagramo 3: (1) La ŝtono en angulo havas du "spirojn". (2) La ŝtono ĉe flanko havas tri. (3) La ŝtono en la centro — kvar. (4) La tri ŝtonoj en la centro — ok.

Ŝtonkaptado estas forkapti ŝtonon, kiu ne havas "spiron". Kiam iu ŝtono estas enfermita de la rivalo kaj ĉirkaŭ ĝi restas neniu libera krucpunkto, tiu ŝtono estas forkaptita. En diagramo 4: (1) La nigra ŝtono sieĝata de tri blankaj ŝtonoj havas nur unu "spiron". (2) Kiam la blanka ŝtono ① estas metita, tiu nigra ŝtono perdas "spiron" kaj estas tuj forkaptita. (3) La dispozicio de la blankaj ŝtonoj post la forkaptado de la nigra ŝtono.

Ne estas limigita la nombro de forkaptitaj ŝtonoj. Oni povas forkapti ajnan ŝtonon, kiu ne havas "spiron".

### 2. "Okuloj" vera kaj falsa

Por sekurigi la metitajn ŝtonojn



estas necese krei liberajn krucpuntojn, kiujn la rivalo ne povas okupi. Tiajn krucpuntojn oni nomas "okuloj". "Okulon" formitan per neinterligitaj ŝtonoj oni nomas falsa "okulo", kaj tiun per interligitaj ŝtonoj — vera "okulo". En diagramo 5: La "okuloj" de (1) (2) (3) estas veraj. (4) Kvankam la ŝtonoj ĉirkaŭas du krucpuntojn, tamen tie estas nur unu "okulo".

Por sekurigi iun grupon almenaŭ du veraj "okuloj" estas nepre necesaj (Diagramo 6).


Unu kompleta "okulo" devas havi tri ŝtonojn, kiam ĝi estas ĉe angulo, havi kvin ĉe flanko kaj sep en la centro (Diagramo 5). Nekompleta "okulo", kiu havas malpli multajn ŝtonojn ol la difinitajn, estas falsa "okulo". Ekz., ĉiuj tri "okuloj" sur krucpuntoj B en diagramo 7 estas falsaj.

### RIPETA MINACO KAJ NERIPETEBLA MINACO


En vejĉio troviĝas ripeta minaco. En tiu situacio la du flankoj povas ripete minaci unu la alian. Vidu la simplajn dispoziciojn en diagramo 8. Se la du flankoj farus ripetan minacon eterne, la ludo daŭrus senfine. Do estas difinita tia regulo: Kiam aperas situacio de ripeta minaco, la minacata flanko ne povas tuj ripeti la minacon al la kontraŭa flanko. Por ripeti minacon ĝi devas atendi ĝis venos almenaŭ ĝia dua vico, do ĝi devas je sia unua vico meti ŝtonon aliloke. Tiu meto estas nomata minaca interludo.

Ripeta minaco koncernas forkaptadon de unu ŝtono inter la du flankoj. Ankaŭ ekzistas aliaj situacioj. Vidu diagramon 9: Post kiam la blanka flanko forkaptas du (A), la nigra povas tuj rekapti (1). Sekve por la blanka flanko ne ekzistas ebleco forkapti ŝtonon de sur tiu ĉi teritorio. Tio estas neripetebla minaco, sed ne ripeta minaco.


Vejĉio estas simpla kaj samtempe tre varia. Supre mi konigis al vi la plej fundamentajn sciojn pri ĝi. Se vi interesiĝas, provu por vin amuzi.



Diagramo 1




Diagramo 2



Diagramo 3

Diagramo 4



Diagramo 5


## Porcelana botelo de Yuan-dinastio

de YING ZI


La porcelanaĵoj kun bluaj desegnoj estas faritaj laŭ jena maniero: Oni faras pentraĵojn per kobalto sur porcelanaj rudimentoj, glazuras ilin kaj bakas ilin en varmega forno. Simplaj kaj elegantaj, ili estas tre valoraj. De la lastaj jarcentoj ili ĉiam ravas la rigardantojn.

La porcelanaĵoj kun bluaj desegnoj faritaj en Yuan-dinastio (1271-1368) estas rigardataj kiel trezoraj artaĵoj pro siaj malmulteco, longa historio kaj originaleco en formo kaj desegno. La tiaj porcelanaĵoj karakteriziĝas per bona kombino de la ĉefa kaj neĉefaj desegnoj, kompakta pentraĵoj sur malsamaj niveloj, klara distingo de la ĉefa kaj neĉefaj partoj, harmonia tuteco de la multaj desegnoj, kiuj tamen ne impresas kiel kolekto de bagateloj.


La apuda porcelana botelo kun ok-angulaj buŝo kaj bazo altas 51.5 cm kun apertura diametro de 6.6 cm longa. Ĝi elteriĝis kune kun sia ĝemelo en 1964 en la urbo Baoding, Hebei-provinco. Ĝi havas tipajn trajtojn de la porcelanaĵoj de Yuan-dinastio: Sur la blua fono de mara akvo levigas kvar blankaj drakoj. Ĝi estas tre valora pro siaj raraj desegnoj kaj originala formo.




Diagramo 6



Diagramo 7



Diagramo 8



Diagramo 9

- |                      |                               |
|----------------------|-------------------------------|
| A. Unua linio        | I. Maldekstra supra flanko    |
| B. Dua linio         | J. Dekstra supra flanko       |
| C. Tria linio        | K. Maldekstra malsupra flanko |
| D. Supra flanko      | L. Dekstra malsupra flanko    |
| E. Malsupra flanko   | M. "Spero"                    |
| F. Maldekstra flanko | N. A                          |
| G. Dekstra flanko    | O. B                          |
| H. Centro            |                               |





Pitoreskejo Jiuzhaigou

Foto de XUE CHAO

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九六年第九期  
(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2

